




## EN VIGBYHOLM...



**PLENA RAPORTO**  
**PRI LA SOMERA KURSO INSTRUKCIA**  
**1938**  
**de la Sveda Esperanto Instituto**

Enhavo:  
Tagaj kaj fakaj protokoloj  
pri  
Esperanto kaj esperantistoj



## Antaŭparolo

La protokolaro de Vigbyholm estas pli ol aro da protokoloj. Verkita de dek-kvino da esperantistoj – kursanoj kaj instruistoj – el kvin diversaj nacioj, ĝi estas dokumento de **kolektiva laboro, kamaradeco, internaciismo**. Prezente necesajn sciojn pri la Esperantaj gramatiko, historio, literaturo, instruado kaj movado, ĝi povas servi kiel **gvidlibro por la Esperanta funkciulo**. Kaj por la partoprenintoj ĝi restas **memoraĵo pri du neforgeseblaj semajnoj** en Esperantio.

Specialan dankon meritas s-ino Boye, kiu afablis verki aldonojn pri gravaj problemoj gramatikaj, kaj f-ino Sundell, kiu prizorgis la multobligon.

Bepp.

## UNUA PARTO: TAGAJ PROTOKOLOJ

### I. Lunde, la 4-an de julio

#### 1. INTERKONATIĜO

Per kortuŝaj vortoj rektoro Sam Janson salutis la ĉeestantojn (14 kursanojn, 2 instruistojn kaj s-ron Eriksson) kaj diris iom pri la **celo de la kurso**; krome li informis la kursanojn pri kelkaj aranĝoj rilate la kurslaboron.

Poste la kursanoj sin **prezentis** kaj el la instruistoj unue s-ro Bepperling el Germanujo per kelkaj vortoj pri sia esperantistiĝo kaj la historia fako, kiun li gvidos; por daŭrigaj kursoj li rekomendis al la kursanoj la libron "Ellernu" de F. Szilágyi.

Post la paŭzo prezentis sin s-ro Bernhard Eriksson, kiu nun post multjara redakto de la sveda Esp.-gazeto La Espero devas forlasi tiun oficon pro malsano. S-ro J. esprimis la plej koran dankon pro lia bona laboro. Fine prezentis sin la literaturo-instruisto, s-ro Morariu el Romanujo, kun sudlanda viglo kaj sprito (Morariu – Mor-ar-iu), kaj rektoro J. diris la temojn de la diskutoj okazontaj kaj parolis pri la **ekzamenoj**.

#### 2. LITERATURO

Post la lunĉ-paŭzo sekvis la unua literatura leciono de s-ro M. Ni komencis per la kanto "Mariston logas vasta mar". S-ro M. rakontis, kiujn librojn li legis dum la unuaj jaroj de la studado de Esperanto. "**Vivo de Zamenhof**" de Edmond Privat li legis trifoje. Poste li informis sin pri la libroj legitaj de la lernantoj.

#### 3. HISTORIO

Sekvis la historia leciono, en kiu s-ro B. unue tre koncize priskribis la vivon de d-ro Zamenhof, citis la gravajn datojn el lia vivo. Poste li parolis pri la **interna ideo** de Esperanto, kiu laŭ Zamenhof estas amo kaj justo inter la homoj. Fine li pritraktis la **vortfaradon** en artefaritaj lingvoj ĝenerale. Li instruis, ke la vortaro estas la karno, la gramatiko la skeleto kaj la stilo la sango de la lingvo.

#### 4. EKZAMENO

Dum la posta leciono la kursanoj tradukis skribe pli-malpli malfacilajn svedajn tekstojn. En la vespero s-ro J. unue daŭrigis la priskribon de Esperanta ekzameno, kaj por doni **modelan ekzemplon** kaj ankaŭ por esplori la elparolon de la kursanoj li igis ilin legi Esperantan tekston kaj poste buŝe traduki ĝin.

Anna Dahlgren  
Anna-Lisa Edenburg

#### II. Marde, la 5-an de julio

##### 1. LITERATURO

Komparante la lingvon kun muzikinstrumento pli-malpli lerte traktata, s-ro M. nomis Esperanton **tutmonda sent-instrumento**, per kiu bona artisto povas elvoki mirindajn sonojn. Tion pruvas la literaturo, kiu konstante ne nur ampleksiĝas, sed ankaŭ pliboniĝas. Nuntempe ekzistas pli ol 5000 volumoj, sed se oni kalkulas la turistajn broŝurojn ktp., la nombro certe duobliĝas.

Oni **dividas** la literaturon je: originalaj kaj tradukaj verkoj – aŭ: prozo kaj poezio – aŭ: belliteraturo, prilingvaj verkoj, sciencaj verkoj, historiaj verkoj kaj biografioj.

**Du periodoj** estas distingeblaj: la komenca aŭ klasika periodo kaj la internacia aŭ propaganda periodo. En la antaŭmilita literaturo oni renkontas ankoraŭ multe da primitiveco kaj infaneco, sed en la postmilita literaturo la formo kaj spirito de la lingvo fariĝas pli maturaj.

La **verkoj de Zamenhof** estas prilingvaj, tradukaj aŭ originalaj, kaj ĉiuj estas karakterizitaj de prudento kaj toleremo. En 1905 aperis **Fundamento de Esperanto**, enhavanta 16-regulan gramatikon, ekzercaron kaj universalan vortaron kun proksime 2500 radikoj, kaj tiu ĉi “Fundamento” garantias la netuŝeblecon de Esperanto.

La plej granda kaj grava parto de la Zamenhofa verkaro estas la **tradukoj**. La unua estis fragmento de “La batalo de l’ vivo” de Dickens. Tre bonstile tradukita estas **Hamleto** de Shakespeare. Tamen ne tro gravas la traduko de tiaj jam disvastigitaj verkoj. Prefere oni helpe de Esperanto donu al la tuta mondo verkojn de malgrandaj landoj. Estas pruvite, ke oni ĝuste per Esperanto tre bone povas trovi trafajn esprimojn eĉ por poemoj.

## 2. GRAMATIKO

Instruis s-ro M. pri la **participaj finaĵoj** -anta, -inta, -onta.

## 3. HISTORIO

S-ro B. daŭrigis sian instruon pri historio. Zamenhof “transiris la Rubikonon”, aperigante en 1887 la broŝuron **Lingvo Internacia** (L. I.). Li uzis la pseŭdonimon **d-ro Esperanto**, kiu iom post iom fariĝis nomo de la lingvo, nomo instiganta nin al optimismo kaj persista laboro.

Grava malfacilaĵo estis, ke neniu kuraĝis presi la broŝuron. Feliĉe la bopatro de Z., Zilbernik, estis idealisto, kiu subtenis la aferon. Fine Z. povis eldoni la libron, unue en la rusa lingvo kaj baldaŭ ankaŭ en aliaj lingvoj.

Poste li devis fari propagandon por la libro. “**L. I. estas komuna propraĵo de ĉiuj. Mi estas nur iniciatoro.**” Ĉiuj do povis evoluigi la lingvon. Z. dissendis la broŝuron tien, kie oni plej bone povis varbi por la lingvo, al redakcioj, internaciaj organizoj ktp. Kaj iom post iom li gajnis adeptojn.

La lingvon ĉefe konservis la interna ideo: sen ĝi nun ne vivus Esperanto. Krome utilas por la sukceso la **simpleco de la gramatiko** kaj la vortfarado per **afiksoj**. Oni ŝparas por la memoro, derivante vortojn per prefiksoj kaj sufiksoj, kaj tiuj help-silaboj povas formi eĉ apartajn vortojn, por ke la lingvo ne ŝtoniĝu. Ĉiam novaj vortoj estas kreataj de la Esp.-aj verkistoj; **la taŭgaj vivas, la netaŭgaj mortas.**

## 4. DAŬRIGA KURSO

Unue s-ro B. parolis pri **instru-metodoj** ĝenerale: la rektaj metodoj (ekz. Cseh-metodo) kaj la instruo pere de nacia lingvo. Oni gramatikumu ne tro nek maltro, paroligu la lernantojn kaj konsciencie korektu iliajn erarojn, speciale ankaŭ koncerne la elparolon, kaj oni vigligu la instruon ankaŭ per gajaj rakontetoj. Krom la lernolibro oni uzu apartan lego-libron, ekz. tiun de Setälä, kiu libro estas bona kaj malmultekosta kaj ankaŭ taŭgas por parker-lernado. La gramatikon oni instruu laŭ jena skemo: ripeto – ekzemploj – regulo – apliko.

En daŭriga kurso oni povas studi libron, ekz. la kongres-paroladojn de nia majstro aŭ la libron “Al Torento”. Oni legu la frazojn laŭte kaj klare, faru konversacion pri la enhavo (ki-vortoj kaj “ĉu”) kaj traktu la gramatikaĵojn, sed ne tiom, ke la lernanto perdas la ĝuon de la verko. Gravaj estas traduko kaj re-traduko, je kiuj oni devas trovi mezan vojon, tradukante nek tro libere nek tro laŭvorte. La lernantoj ankaŭ ricevu taskojn por **liberaj paroladoj** – ĉiam oni parolu laŭ plano – kaj la malpli kapablaj lernu ion parkere. La plej alta ŝtupo estas **originala verkado**, kaj la premiso al ĝi estas ekskluziva pensado en Esperanto.

Tre rekomendata estis la lernolibro de d-ro Szilágyi, “**Ellernu**”, ĉar oni pere de ĝi povas aranĝi tre varian kurson daŭrigan.

#### 5. EKZAMENO

Vespere s-ro Gerdman redonis la korektitajn skribtaskojn kaj pritraktis kelkajn en ili faritajn erarojn.

Siri Bergström

### III. Merkrede, la 6-an de julio

#### 1. DAŬRIGA KURSO

La leciono komenciĝis per la speciala kanto de la Vigbyholma kurso. S-ro B. daŭrigis la trakton de la lernolibro “Ellernu” kaj parolis pri la uzo de ties bildoj (lumbild-aparato) kaj literaturaj partoj; poste li montris kaj komentariis la lernolibrojn de **Massiak, Seppik – Malmgren, Seppik kaj Sam Owen Jansson**.

#### 2. LITERATURO

S-ro M. komence resumis pri la tradukoj de Zamenhof kaj emfazis, ke Zamenhof tradukis verkojn el multaj lingvoj kaj laŭ certa plano. Poste li parolis pri la **originala verkaro** de Z. prilaborita de d-ro Dietterle; tiu verkaro enhavas ankaŭ ĉiujn kongres-paroladojn de Z. Aparte grava verko estas la **Fundamenta Krestomatio**. Per siaj tradukoj kaj paroladoj Zamenhof vivigis la lingvon.

#### 3. GRAMATIKO

Prelegis s-ro Nylén pri la **lingvo kiel ĝenerala fenomeno**, parto de nia vivo. Fremdajn lingvojn oni ne povas perfekte lerni – escepte de Esperanto, kiu estas simpla, reguligita kaj en siaj elementoj natura. Li plutraktis la **strukturon de Esperanto** kaj la principon pri neceso kaj sufiĉo kaj citis certajn scientistojn pri la vortfarado; Esperanta vorto ofte diras pli ol sinonima vorto en nacia lingvo.

Post la paŭzo s-ro N. prelegis pri la **elparolo de Esperanto** kaj traktis unue la vokalojn, poste la konsonantojn, en ambaŭ okazoj komparante Esp-on kun aliaj lingvoj.

#### 4. INTERPRETADO

Sub la gvido de rektoro S. Jansson okazis interpreto-ekzerco. Unue parolis s-ro Morariu, kaj ĉiu el la kurs-partprenantoj, unu post la alia, interpretis lian parolon sveden. Poste parolis s-ro Bepperling, kaj la kursanoj denove interpretis. Ĉar la eksterlandaj kursanoj ĝis nun ne partoprenis, s-ro M. faris novan paroladon, kaj unu el la finnoj, s-ro Jokinen, tradukis en la finnan, poste la latvo, s-ro Mikelsons, tradukis en la latvan. Fine s-ro Bepperling germanigis kaj svedigis Esperantan paroladon de s-ro Morariu, kaj tiu ĉi rumanigis, hungarigis kaj svedigis Esperantan paroladon de s-ro B.

#### 5. VESPERA PRELEGO

Por la ne-esperantistoj en Vigbyholm okazis varba prelego de s-ro B. pri la temo **Malnova revo realiĝas**. La prelegon antaŭis salutparoloj de niaj eksterlandanoj. Kiel tradukantoj funkciis f-ino Dahlgren kaj s-ro Söderqvist. Sekve de nia propagando ni povis vendi multajn Esp.-ĝlosilojn kaj en la postaj tagoj 10 ekzemplerojn de la lernolibro "Systematisk kurs".

Kurt Salomonsson

Elsa Nyberg

### IV. Jaŭde, la 7-an de julio

#### 1. HISTORIO

La preleganto iomete parolis pri la lingvo-projekto **Volapük**, kiu trovis sufiĉe da adeptoj, sed estis malbona kaj devis cedi al Esperanto. Amerika scienca komitato, konsistanta el 3 personoj, trovis Esperanton multe pli bona ol la lingvon Volapük. Unu el la komitatanoj, Henry Phillips, fariĝis tre aktiva esperantisto. Aliaj pioniroj estis la polo **Grabowski**, verkinto de "Tagiĝo", kaj la germano **Leopold Einstein**, kiu igis la Volapük-klubon en Nürnberg transiri al Esperanto. En tiu ĉi urbo aperis la unua Esp-a gazeto, **La Esperantisto**.

#### 2. DAŬRIGA KURSO

S-ro B. atentigis la kursanojn pri morgaŭa ekskurso al la kunvenejo de la laborista klubo Stokholm-a, kaj ke en la kunveno prizorgos la programon la kursanoj. Poste estis leciono pri la **akuzativo**.

#### 3. LITERATURO

Ni ĝuis prelegon de s-ro M. pri la **poemoj de Zamenhof**. Estas 9 poemoj, kiujn oni dividas en 4 grupojn. S-ro M. deklamis jenajn poemojn: La espero, La vojo, Ho mia kor', Sub la verda standardo, kaj gramofon-disko aŭdigis la himnon kaj la poemon "Tagiĝo" de Grabowski.



#### 4. GRAMATIKO

S-ro M. instruis pri la **aktivaj kaj pasivaj participoj**, donante multajn ekzemplojn. Gravas, unue instrui la participojn kaj nur poste la kunmetitajn verb-formojn.

#### 5. TRADUKO EN ESPERANTON

Alvenis s-ro rektoro Jansson kaj sciigis la gelernantojn, ke proksiman lundon komenciĝos la supera ekzameno. Kiuj ne jam faris la elementan ekzamenon, rajtas uzi vortaron. Por **prepari la ekzamenon**, s-ro J. igis la gelernantojn traduki kelkajn historietojn en Esperanton.

#### 6. VESPERA PRELEGO

Redaktoro Morariu faris publikan prelegon en la granda kunveno pri **Rumanujo, la lando de la oleaj fontoj** kaj poste montris lumbildojn pri la sama lando. F-ino Edenburg kaj s-ro Salomonsson interpretis. Krom la Esp-a grupo ĉeestis ĉirkaŭ 45 personoj, kies forta aplaŭdo montris plenan kontenton pri la vespero; multaj aĉetis la Esp.-an ŝlosilon.

Bertil Svensson

Walter Söderqvist

#### V. Vendrede, la 8-an de julio

##### 1. HISTORIO

S-ro B. rakontis pri nia pioniro **Trompeter**, kiu dum tri jaroj oferis multe da mono por la movado, kaj pri la **voĉdonoj** de la esperantistaro en 1894.

##### 2. LITERATURO

Dum la sekvantaj du horoj s-ro M. pritraktis **Grabowski**, la patron de la Esperanta poezio, kaj **Kabe**, la faman stiliston de la antaŭmilita periodo.

##### 3. HISTORIO

S-ro B. daŭrigis sian historian prelegon. Ni aŭdis pri la malfacilaĵoj en Ruslando pro malpermeso de la gazeto La Esp-isto kaj pri la **sveda periodo**, en kiu ludis gravan rolon nia eminentulo, s-ro Nylén. Malgraŭ ĉio la movado tamen kreskis.

##### 4. DAŬRIGA KURSO

S-ro B. diris iom pri la **korelativa tabelo**. Poste ni preparis programon por la vespero, kiam la kursanoj vizitos la semajnan kunvenon de la SLEA-grupo en Stockholm.

5. RENKONTIĜO KUN LA LABORISTA KLUBO STOKHOLMA

Kolektiĝis en **Fåfångan** multaj gesamideanoj, inter ili ankaŭ kelkaj eksterlandanoj. Ĉi-lastaj salutis la ĉeestantojn en la nomo de esperantistoj de siaj landoj. La kursanoj kunhelpis per deklamo, parolado kaj teatraĵo. La vespero restas en nia memoro.

Siri Bergström

Asta Håkansson

VI. Sabate, la 9-an de julio

1. KLUBA LABORO

S-ro Martin Johansson prelegis du horojn pri la kluba laboro. Li akcentis la valoron de klubo en la Esp-a movado, dirante ke **izolulo ne povas multon fari, sed homoj devas kuniĝi**. Ĉi-ĉio komcernas ankaŭ la esperantiston. Tre amplekse li pritraktis ĉiujn punktojn, kiuj vigligas la kluban laboron.

2. KURSA ORGANIZO

S-ro Morariu detale pritraktis la temon: **Kiel agi antaŭ la kurso?** I. a. li klarigis la valoron de la propagando kaj menciis kelkaj ekzemplojn el la praktiko.

3. HISTORIO

Prelego de s-ro B. pri la **franca periodo** en la evoluo de Esp-o, precipe pri la propagando-metodoj de **Beaufront**.

K. Jokinen

VII. Dimanĉe, la 10-an de julio

EKSKURSO AL TULLINGE

Per vagonaro ni veturis al Tullinge, kaj poste ni piediris al Torpet, kie ni pasigis kelkajn gajajn horojn, kantante, parolante kaj dancante. Ĉeestis krom la instrukcia kurso multaj samideanoj el la ĉirkaŭaĵo de Stokholmo. Reveninte en Stokholmon, ni komune tagmanĝis, kaj kelkaj el ni partoprenis boat-vojaĝon. Bedaŭrinde la vetero estis malbona.

Bertil Svensson

VIII. Lunde, la 11-an de julio

1. HISTORIO

Post kanto de la himno ni aŭskultis prelegon pri **Bourlet, Hachette kaj Cart**.

## 2. DAŬRIGA KURSO

S-ro B. prezentis sistemon pri la **afiksoj** kaj parolis pri **homonimoj** kaj **sinonimoj**.

## 3. LITERATURO

S-ro M. priparolis la **antologiojn**.

## 4. SUPERA SKRIBA EKZAMENO

Unue estis traduko en la svedan, poste traduko en Esperanton.

Dum la lecionoj ni ricevis viziton de s-ino Boye el Stokholmo kaj f-ino Bodén el Borlänge. Pli poste venis nia angla amiko, s-ro Mell, kaj li estis nia gasto dum la vespero, same f-ino Henriksson kaj s-ro Gerdman. Ni finis la tagon per promenado al kafejo, kie Esperanto estis parolata en tre gaja humoro.

Anna-Lisa Edenburg

## IX. Marde, la 12-an de julio

### 1. LITERATURO

S-ro M. priparolis la du postmilitajn verkistojn **Baghy** kaj **Kalocsay**, kiuj ambaŭ estas hungaroj kaj antaŭ nelonge festis la arĝentan jubileon de sia esperantistiĝo. Pri Baghy ni eksciis i.a. ke li debutis kiel Esperanta poeto, estante milit-kaptito en Siberio.

### 2. HISTORIO

S-ro B. transiris al la trakto de la **internacia periodo**, kiun inaŭguris la unua universala kongreso en **Bulonjo sur Maro**. Ni sciigis pri la problemoj diskutataj dum la kongreso, la entuziasmo pri la "Pentekosta miraklo" de universala interkompreniĝo kaj la t.n. Bulonja deklaro.

### 3. DAŬRIGA KURSO

La leciono temis pri **sufiĉo** kaj **neceso**, kiun principon s-ro B. klarigis je kelkaj ofte uzataj sufiksoj kaj sufiks-kombinoj.

### 4. VESPERA PRELEGO

La hungara verkisto d-ro Szilágyi analizis en tre interesa prelego **La hazardo en la Esperanta literaturo** kelkajn ĉefverkojn de la moderna literaturo Esperanta. Antaŭ la prelego prezentis lin s-ro B. kiel aŭtoron de famaj lernolibroj kaj de "Trans la fabeloceanon", s-ro M. kiel redaktoron de Literatura Mondo, membron de Lingva Komitato, tradukanton de poemoj, kunlaboranton de antologioj kaj de la Enciklopedio, sukcesan Esperanto-instruiston. Post la prelego okazis diskuto, en kiu s-ro B. deklaris, ke li nun devas tute revizii sian en la lernejo akiritan opinion pri la

valorigo de la hazardo en la literaturo. S-ro S. ankaŭ koncize traktis la **Esperantan gazetaron**.

X. Merkrede, la 13-an de julio

1. HISTORIO

S-ro B. traktis unue decidojn de la Bulonja kongreso kaj poste gravajn okazaĵojn el la **sekvaj kongresoj**. Fine li donis sciindajn nombrojn pri la kongres-partoprenado, nome pri maksimumo kaj minimumo de la reprezentataj landoj, aliĝintoj, efektivaj kongresanoj kaj partopreno en laborkunsidoj.

2. DAŬRIGA KURSO

S-ro B. montris, kiel oni sisteme studas la **Esperantan vortaron** kaj kiel oni povas instrui la **infinitivon**.

3. LITERATURO

S-ro M. prelegis pri la originalaĵoj kaj tradukoj de **Kalocsay**. Antaŭ la leciono li aranĝis **vendadon de literaturo** en la lernoĉambro.

4. EKZAMENO

Rektoro Jansson traktis la skribajn ekzamen-provojn de la partoprenantoj kaj faris diversajn sciigojn koncerne la kurslaboron.

5. RENKONTIĜO KUN LA GRUPO ESPERANTISTA DE STOKHOLMO

La vesperan kunvenon de la klubo en **Vallingatan** ĉeestis ĉirkaŭ 100 gesamideanoj. Ni kursanoj faris multpaĝan kaj tre varian **Vivan Gazeton**, kiun la publiko akceptis kun granda intereso. La sukceson ni dankas unuavice al la lerta redakto de s-ro Morariu.

Kurt Salomonsson

XI. Ĵaŭde, la 14-an de julio

Laŭ kutimo ni komencis per kanto. Ĉi-foje "Kristalo, la bela". Poste s-ro B. diris, ke necesas por tiuj kiuj ne jam faris ĝin, elekti temon por la sabate okazonta instru-provo.

1. GRAMATIKO

Prelegis redaktoro Paul Nylén. Pri la **akcento** li diris, ke svedoj ofte akcentas Esp-ajn vortojn laŭ sveda maniero (t.e. kun du akcentoj), dume finnoj kaj hungaroj ofte emas

akcenti la unuan silabon; ambaŭ manieroj kompreneble estas malbonaj. Pri la **participoj** li diris, ke oni ne miksu la adjektivan formon kun la adverba, kaj ke oni ne trouzu la kunmetitajn formojn de la verbo. Pri **vortfarado** validas jenaj finaĵo-difinoj: -o = kio estas, -a = kiu havas la econ, -i = fari agon.

Antaŭ la dua horo de la gramatika leciono ni kantis la Vigbyholman kanton, kaj post la leciono la lerneja mastrino regalis nin per suko.

## 2. HISTORIO

S-ro B. parolis pri U.E.A. kaj ĝia fondinto **Hodler**, poste pri la nova mondorganizo I.E.L. Krome li parolis pri la **Ido-skismo**. Ido estis ellaborata de la eks-esperantisto s-ro Beaufront. La plej multaj esperantistoj restis fidelaj al sia lingvo.

## 3. DISKUTADO

Post la tagmanĝo alvenis s-ro Sam Jansson, por gvidi vesperan diskutadon alige al paroladoj de la kursanoj. Unue parolis la latvo, s-ro Mikelsons, pri **Kiel Esperanto povas servi kaj konservi la pacon en tutmondo?** Poste estis la vico de la finno, s-ro Jokinen, kiu traktis la temon **Kurslaboro**. S-ro E. Malmgren, alveninta samtempe kun s-ro S. Jansson, ekfunkciigis diskutadon per kelkaj vidpunktoj pri tiu temo. La aliajn paroladojn oni devis prokrasti por la sekva tago.

La kurslaboro finiĝis je la 20-a kaj 15, kaj poste ĉiuj gekursanoj vizitis prezentadon de "Röstskolan", konsistantan el kantoj kaj rakontoj.

Bertil Svensson

## XII. Vendrede, la 15-an de julio

### 1. ORGANZAĴOJ

S-ro M. Johansson skizis strukturon kaj funkciadon de la **lokaj, landaj kaj tutmondaj** Esperanto-organizoj kaj donis informojn pri I.F.E.T.T., t.e. La Internacia Federacio Esperantista de Trafik- kaj Transport-laboristoj, al kiu li kiel tramisto apartenas. En la posta **diskuto** kontribuis la kursanoj per informoj pri diversaj aliaj **fak-organizoj** kaj lokaj rilatoj al A.B.F. kaj la kooperativo.

### 2. LITERATURO

S-ro M. parolis pri la fama pola verkisto **Jean Forge**, kies unua libro, la romano "Abismoj", aperis en 1923. En tiu libro la personoj mem rakontas pri siaj sortoj, agoj kaj pensoj. Pro sia bona kaj klara stilo Forge ricevis laŭdon de la hungara eminentulo Baghy.

Alia bona verkisto estas la franco **Raymond Schwartz**. Unu el liaj plej bonaj libroj estas la poemaro "Verdkata testamento". S-ro Schwartz estas tre sprita, kaj en liaj libroj estas multaj bonaj vortludoj. Kelkajn el liaj spritaĵoj laŭtlegis s-ro M.

Poste ni aŭdis pri **Edmond Privat**, la fama historiisto de nia movado. Dank' al li Esperanto estis akceptata kiel klara lingvo por la telegrafio.

Bertil Svensson

### 3. HISTORIO

La leciono temis pri la **laborista esperantismo**. S-ro B- priskribis la evoluon de la mond-organizo S.A.T. kaj diris iom pri la **landaj organizoj** laborist-esperantistaj. Krome li citis ĉefverkojn el la laborist-esperantista **literaturo**.

### 4. DAŬRIGA KURSO

S-ro B. preparolis la libron **Esprimo de sentoj en Esperanto**, kiu estas bonega enkonduko en la Esperantan **stilistikon**. Post la leciono ni daŭrigis kaj finis la ĵaŭde komencitan diskutadon.

### 5. KURSFINA FESTO

Vespere okazis la finfesto en bele aranĝita salono. La kursanoj **ornamis** la instruistojn, la instruistoj la kursanojn **per verdaj steloj**. La bona kafo rezultigis multajn spritajn paroladetojn. Finiĝis la feston per kanto de la himno.

## XIII. Sabate, la 16-an de julio

### 1. LITERATURO

S-ro M. kompletigis siajn lecionojn pri la **moderna literaturo**, traktante Hohlov, Sturmer, Hilda Dresen k.a. kaj finis per mencio de la plej gravaj **Esperantaj eldonejoj**.

### 2. INSTRU-PROVOJ

Ĉar kelkaj kursanoj jam estis forvojaĝintaj, ne ĉiuj povis liveri instru-provojn. La provoj estis tre bonaj sed montris, ke oni devas fari ilin jam komence de la kurso, por ke la gvidanto de la gramatika kaj pedagogia partoj povu laŭbezone fari modelan praktikan instruon pri la diversaj reguloj (S.J.). La surprizo de la tago estis s-ro Lundholm el Smedjebacken, kiu ŝajnis esti iom pasiva dum la tuta kurso kaj nun en la lasta tago montris altajn kvalitojn pedagogiajn.

### 3. ĜENERALA DISKUTADO

**La kurso donis**, oni diris kvazaŭ unuvoĉe, **multe**, eĉ tro multe. Oni deziris iom pli da libera tempo por rekreado kaj por preparado al bela ekzameno. Eble la **protokolado**

forprenis troan tempon, kaj oni povos aŭ pli skize fari tiun laboron aŭ plidisigi la taskon, se la kurso kalkulos pli grandan anaron; la skizan raporton al A.B.F. kaj la Sveda Esp.-Instituto povus fari la protokolestro.

Iu kaj alia deziris pli da lingva ekzercado, verŝajne **tradukado el la sveda** kun diskutoj pri gramatikaj problemoj. Tio okazu prefere ol literatura kaj historia instruado. Ni konsentas, se iu volas prepari sin nur por lingva instruado en komenca kurso. **Por supera ekzameno kaj instruado en progresiga kurso**, kaj tien ĉiu partoprenanto en Esperanta seminario provu atingi, **ne sufiĉas nura lingvoscio**. La movado kaj la literaturo en ilia evoluo estu nepre studotaj. Naturan solvon de la problemo donus tia aranĝo pri kio mi (Sam Jansson) esprimis dezirojn, ke **venontaj kursoj donu samtempe instruon diversgradan** por studintoj de komenca korespondkurso, por studentoj al supera ekzameno, por gvidantoj de daŭrigaj kursoj. Koncize dirite la kursoj estu: **komenca, progresiga, seminaria**. Se tio pruvigo praktika, la kursoj, 2-semajnaj, povus sekvi unu la alian, tiel ke **ĉiu povus partopreni du kursojn**: 1 kaj 2, aŭ 2 kaj 3. Tia aranĝo progresigus multe komencanton kaj kapabligus studenton, kiu ne multe parolis nek aŭdis la lingvon, sukcese partopreni la daŭrigan kurson. **Stipendiato** ja devas lerni kaj esti ekzamenata laŭ la fiksita plano, sed **alia kursano** rajtas elekti instruon laŭplaĉe kaj akiri partecan elzamenan ateston.

La rektoro

#### 4. FINVORTOJ

En sia finparolado la rektoro dankis por la montrita intereso kaj atentigis pri **tri gravaj laborkampoj**: la radio, la gazetaro, la lernejoj...



Sam Jansson

## DUA PARTO: FAKAJ PROTOKOLOJ

### I. ENKONDUKA PAROLADO

Lunde, la kvaran de julio

Tre estimataj, mi diras al vi koran bonvenon al la somera seminaria kurso de la Sveda Esperanto-Instituto. Nia movado estas **praktike ideala kaj ideale praktika**. Ĝi bezonas por progresi ĉiam reviviĝi, konstante revigliĝi, lernadi per novaj spertoj kaj instrui siajn anojn pri spertoj jam faritaj, pri celoj atingitaj kaj starigitaj sur la diversaj kampoj: la instrua, la utiliga, la propaganda.

Tiu ĉi kurso volas doni **eblecon interesanĝi tiajn spertojn**. Verŝajne la gvidantoj de la diversaj lecionoj havas pli riĉan spertaron, sed ĉiu partoprenanto nepre donu el sia propra dum la diskutoj, por ke tiuj nepre estiĝu vigligaj, tiel ke nia kunesto donu belajn fruktojn por nia movado.

Vi ja venis – la plimulto el vi – ĉi tien kiel **stipendiatoj**. Vi petis stipendion, ĉar vi deziras pliboniĝi kiel **gvidantoj**. Helpu vi mem, por ke la rezulto korespondu al viaj deziroj kaj la espero de A.B.F. Mi certe ne bezonas memori vin pri via devo multon lerni kaj poste **utiligi viajn pli profundajn sciojn en la servo de A.B.F.** Tiu, kiu amas la studon de Esperanto, ne laboras por propra profito, sed pelita de la sama forto, kiu pelis, instigis nian majstron Zamenhof, oferi sian vivon al tiu alta ideo kapabligi la homojn kompreni unu la alian pere de facile lernebla, simpla, klara kaj pro tio facile komprenebla lingvo, kaj tiamaniere li helpas ilin malfermi la korojn por akcepti aliajn vidpunktojn pri internaciaj kaj naciaj problemoj ol ŝovinistajn, egoistajn.

Dezirante ke la instrukcia kurso de 1938 gvidu nin iom antaŭen sur tiu bona vojo, mi deklaras la kurson malfermita.

Unue ni  **prezentadu**  nin: 1) partoprenantoj laŭ la listo, 2) gvidantoj. En  **kartoteko**  ni konservos vin kaj notos viajn sukcesojn. La  **celo de la kurso**  estas duobla, nome supera ekzameno kaj la kapabligo bone instrui en komencaj kaj daŭrigaj kursoj.

Jam hodiaŭ ni havos  **ekcercan tradukon**  el la sveda kaj  **modelan elementan ekzamenon** , kiu celas precipe kontroli, ĉu vi havas modelan elparolon, kio ja estas necesa ĉe



instruistoj. Merkredon ni aranĝos **interpretadon**, eble ankaŭ vespere ĉe eventuala prelego por aliaj kursanoj en Vigbyholm. Sekvos en la aliaj tagoj traduk-provoj, **paroladetoj** 5-minutaj kaj **diskutoj** pri al vi senditaj aŭ aliaj temoj. Dum du vesperoj vi montros en la Stokholmaj Esp.-kluboĵ, ke vi povas **aranĝi interesajn kunvenojn**. En la lasta tago vi faru **instru-provojn**, kiujn ni kritikos, por ke vi lernu pli kaj pli bone kaj praktike instrui. Finiĝos la kurso per **ĝenerala diskutado**, en kiu ĉiu diros, kion lia koro deziras.

Ne forgesu poste **danki al A.B.F.** kaj raporti pri la kurso kaj pri via laboro posta kaj kiel vi pli bone povis instrui en via studrondo.

Mi petas vin fari grandan laboron dum la kurso. **Protokolu** la lecionojn, por ke la instituto kaj vi mem havu memoraĵojn bonajn. Bepp kolektos kaj redaktos, kaj vi ĉiuj havos kopion.

Bonvolu nun elekti inter vi prezidanton ktp.

La rektoro

## II. HISTORIO

(Protokolintoj: Kaarlo Jokinen, Kurt Salomonsson)

### 1. Lunde, la kvaran de julio

La subskribinto prelegis pri la t.n. **krea periodo** en la evoluo de Esperanto. La aŭtoro de la lingvo, **Ludviko Lazaro Zamenhof**, jam kiel knabo sentis la signifon de neŭtrala lingvo por la pacigo de la homaro. Li observis la malamikecon interpopolan en sia gepatra urbo kaj kredis, ke tiu malamikeco foriĝos, se la homoj interkompreniĝos per supernacia lingvo. Estante gimnaziano, li jam elleboris projekton de artlingvo, kies **interna ideo** estas paco kaj justo inter ĉiuj homoj. Iom post iom la junulo Zamenhof trovis, ke artlingva gramatiko devas esti malmultregula kaj senescepta kaj ke la vortaro de tia lingvo devas baziĝi sur eta nombro de radikvortoj. La vortfarado okazu kiel en la naturaj lingvoj per prefiksoj kaj sufiksoj, sed ĉi-lastaj havu klare limigitan signifon kaj ŝparigu la lernadon de nenecesaj radikoj. Gravaj estas ankaŭ la fonetikeco de la alfabeto kaj la reguleco de la akcento. Kontraŭe al antaŭaj projektoj de artlingvo la projekto de Zamenhof estas empiria, kio signifas, ke la vortoj ne estas arbitre kreitaj, sed laŭeble naturaj kaj internaciaj.

Kvankam la aŭtoro jam en 1878, forlasante la gimnazion, opiniis sian lingvon tute preta, li dum la posta tempo radikale ŝanĝis kaj plibonigis, ĝis kiam la lingvo, elprovita per tradukoj kaj ĉe originala verkado, fariĝis tute viva. Nur fininte la universitatajn studojn kaj komencante la praktikon de okulkuracisto en Varsovio, Zamenhof publike elpaŝis kun sia projekto.

Ernst Bepperling

## 2. Marde la kvinan de julio

S-ro B. komencis la lecionon per ripeto de la antaŭa en resuma formo. Poste li pritraktis la Zamenhofan decidon pri publikigo de la projekto, la malafablon de la eldonistoj, la helpon flanke de la bopatro Zilbernik kaj la eldonon de **Lingvo Internacia**. Estis menciite, ke Zamenhof uzis la preŭdonimon **D-ro Esperanto** (= doktoro kiu esperas) kaj ke la nomo Esperanto iom post iom transiris al la lingvo. La preleganto plu klarigis, kial Z. uzis kaŝnomon, kaj le opiniis, ke tiu nomo estas tre bona, ĉar ĝi esprimas la optimismon de la adeptoj. S-ro B. ankaŭ parolis pri la enhavo de la unua libro: 16-regula gramatiko + ekzercaro + vortaro, kaj aldonis, ke la Fundamento de Esperanto, kiu aperis nur en 1905, havas similan strukturon. La unua libro aperis ruslingve, sed baldaŭ ankaŭ en la lingvoj pola, franca, germana kaj angla.

Zamenhof sciis, kiom gravas propagando, kaj instinkte li sentis la valoron de **kolektiva laboro**. Li konsideris la lingvon propraĵo de ĉiuj kaj tial donis ĝian evoluigon en la manojn de la uzantoj. Per tio li akiris entuziasmajn adeptojn. La unua libro estis sendata al societoj kaj scienculoj diverslandaj. Almetita al ĝi estis papero kuna jena teksto: Mi subskribinta promesas, ke mi lernos la lingvon internacian de d-ro Esperanto, se estos montrite, ke 10 milionoj da personoj subskribis la saman promeson.

La unuajn adeptojn instigis ĉefe la interna ideo de Esperanto. Dank'al ĝi la lingvo staras hodiaŭ sur tiom firma fundamento. La spirito de la lingvo montriĝas krome en logikeco kaj simpla de la gramatiko, en la internacia stilo kaj la aglutina vortfarado. **Aglutinismo** (al-glu-iĝ-eblo) signifas, ke la vort-elementoj estas neŝanĝeblaj kaj libere kunmeteblaj, kaj ke la afiksoj povas uziĝi radike. Tiuj ecoj garantias, ke la lingvo restas viva; kunmetaĵoj ne povas ŝtoniĝi.

## 3. Ĵaŭde, la sepan de julio

Post korekto de miskompreno en faka protokolo la preleganto diris, ke Zamenhof elpaŝis kun sia projekto ĝuste, kiam la artefarita lingvo **Volapük** atingis sian kulminon. Dum Volapük plej forte bruadis, ĝi havis 25 gazetojn kaj reprezentantojn

en 25 landoj. Sed la fabelo de Volapük estis mallonga. La malkontento pri la troarteco de tiu lingvo kreskis, kaj la aŭtoro, la germana pastro Schleyer, reformis la lingvon, sed tute laŭ propra bontrovo. Jam en 1888 kaj 1889 (kongreso en Parizo) fariĝis skismo, kaj poste la movado regresis de jaro al jaro.

En 1887 esploris 3-membra komitato de **Amerika Filozofia Societo** la sciencan valoron de Volapük kaj venis al tute negativa rezulto. Sed ricevinte la broŝuron de Zamenhof, ĝi konstatis, ke Lingvo Internacia estas bonega tipo de artefarita lingvo. Unu el la komitatanoj, Henry Phillips, tre interesiĝis pri Esperanto kaj fariĝis fervora apostolo de la movado. Li postulis, ke okazu kongreso de sciencaj asocioj, kongreso kun aŭtoritato, por definitive solvi la helplingvan problemon. Feliĉe la kongreso ne okazis. Feliĉe, ĉar vera aŭtoritato nur povas esti la Esperanta popolo, ne kongreso de scienculoj, kiuj kutimas daŭre kritiki kaj reformi.

En Germanio estis la lulilo de la Esp-a movado la grupo Nürnberg, kiu estiĝis el Volapüka societo en 1888. Tiu grupo aperigis la unuan Esp-an gazeton, **La Esperantisto**, en 1889. Komence la gazeto estis, almenaŭ parte, trilingva, ĉar ĝi enhavis tekston en la germana, franca kaj Esperanta lingvoj, sed poste ĝi aperis nur en Esperanto. Plej favora estis la eldonanto, Leopold Einstein, kiu i.a. verkis la broŝuron "La Lingvo Internacia kiel plej bona solvo de la mondlingva problemo". Bedaŭrinde li mortis jam en 1890, unu jaron post la ekapero de la gazeto. La plej multaj abonatoj estis rusoj, kaj tre frue jam ekzistis grupo en Moskvo.

Inter la unuaj esp-istoj estis krom idealistoj ankaŭ lingvaj amatoroj, kiuj estis danĝeraj pro sia kritikemo kaj **reformemo**, danĝeraj en tiu tempo, kiam la movado ankoraŭ ne estis forta. Kritikemaj estis ankaŭ multaj eks-volapükistoj, ĉar ili jam antaŭe kondamnis Volapükon kaj nun kritike rilatis al ĉiu nova projekto. Inter ili estis ankaŭ **Grabowski**, kiu, kvankam vera idealisto, proponis diversajn reformojn kaj eĉ eldonis libron, "Liro de esp-istoj" en iomete reformita Esperanto. Tamen li fine revenis al Esperanto kaj restis ĝis la morto fidela adepto.

#### 4. Vendrede, la okan de julio

Post la morto de Einstein la gazeto estis eldonata de d-ro Zamenhof ĝis 1891 kaj poste de la germana termezuristo W.H. **Trompeter** loĝanta en la urbo Schalke (Vestfalia). La preleganto montris la portretojn de Einstein kaj Trompeter. Trompeter oferis multe da mono por la movado, ĉar li dum 3 jaroj pagis krom la eldonkostoj ĉiumonate 100 markojn por la redakto de la gazeto. Sed tiu idealisto bedaŭrinde estis unu el la reformemuloj, opiniante, ke la movado progresas tiom malrapide nur pro la malbonaj flankoj de la lingvo. En letero al d-ro Guminski en Saratov skribis Zamenhof i.a.: "En la fino de la jaro 1893 s-ro Trompeter sciigis min, ke se mi ne elpaŝos persone kun

radikalaj reformoj, li ĉesos eldonadi la gazeton.” Sekve Zamenhof starigis reformprojekton, kiu ege diferencis de Esperanto, kion montras analizo de “Patro nue”. Voĉdono okazis pri jenaj 4 demandoj: 1) ĉu neniuj ŝanĝoj? 2) ĉu ŝanĝoj laŭ la reformprojekto de Z.? 3) ĉu tute aliaj ŝanĝoj? 4) ĉu ŝanĝoj nur principe laŭ la reformprojekto? Jam tiam s-ro **Nylén** estis fervora esperantisto kaj pledis por konservo de la ĝisnuna formo. Ĉar voĉdonis maltra personoj, okazis dua voĉdono, en kiu la plimulto (60%) malaprobis ĉiujn reformojn. Fine de la sama jaro Trompeter ĉesigis la subvenciadon, kaj komenciĝis malfacila tempo por la movado. Sub la influo de kritikemaj eks-volapükistoj Esperanto regresis en Germanio, kaj en 1903 la grupo Nürnberg transiris al la nova lingvo-projekto Neutral. Tamen oni ĝenerale ne plu disputis multe pri reformoj, ĉar la voĉdonado 1894 estis montrinta la volon de la plimulto; anstataŭ ol disputi, oni laboris, studante Esperanton kaj kreante valoran literaturon.

La rusa grafo **Leo Tolstoj**, kiun oni povas nomi kristana anarkisto, tre ŝatis Esperanton pro ties interna ideo kaj diris en letero, ke la lernado de Esperanto kaj ĝia disvastigado estas sendube kristana afero. Li verkis artikolon “Prudento kaj kredo”, kiu esperantigita aperis en la februar-numero 1895 de la Esp-isto. Sekve de tio la rusa cenzuro malpermesis la gazeton por Ruslando, kaj per tio la gazeto perdis 3 kvaronojn de la abonantoj. Ĝi ne plu povis vivi, la lasta numero aperis por majo kaj junio 1895.

Estis kvazaŭ nokto, la tutan movadon minacis pereco. Savis la fervoro de idealistoj. Ankoraŭ en 1895 aperis nova gazeto en la sveda urbo Uppsala, **Lingvo Internacia**, kiun redaktis dum pluraj jaroj nia Paul Nylén. Oni povas paroli pri la sveda periodo en la evoluo de Esperanto, kaj tiam Uppsala estis centro de la movado. Speciale studentoj aliĝis al la movado kaj gvidis ĝin. Tamen estis malfacile vivteni la gazeton. Rusoj sub gvido de s-ro Gernet subvenciis ĝin, kaj por akceli la internan kreskon, la gazeto aranĝis literaturan konkurson en 1896. En 1900 transiris la eldonado al la hungaro Paul de Lengyel, kiu fariĝis redaktanto en 1901, sed cedis tiun oficon poste al la franco Paul Fruictier en Parizo.

El la grupoj fonditaj en la unuaj jaroj estas plej menciinda la societo Espero en Peterburgo, ĉar ĝi estis la centro de la ideismo. Ruslandanoj estis la kerno de la movado, kaj krom en Moskvo en Peterburgo fondiĝis grupoj en Varsovio, Vilno, Helsinko kaj Odessa, t.e. la ĉefurboj de la rusaj provincoj. Ekster Ruslando estiĝis grupoj ekz. en Sofia (Bulgario), Gotenburgo (Svedio), Reims kaj Soissons (Francio). Laŭ nombro de la adeptoj la esperantismo nur malrapide kreskis, sed des pli grava fariĝis la kvalita kresko, t.e. la kresko de valora literaturo, kiu formis veran fundamenton por la nova jarcento.

Fine s-ro B. menciis, ke en 1894 la kvinpinta stelo fariĝis simbolo de la esperantismo.

#### 5. Sabate, la naŭan de julio

En la esperanta historio oni povas distingi 4 periodojn: 1) la kreaĝo 1887, 2) la rusan (kaj svedan) 1887 – 1888, 3) la francan 1898 – 1905, 4) la internacian ek de la unua kongreso 1905.

Ofte aperas en la historio de la movado apud la kreinto persono aparte kapabla, kvazaŭ “dua patro” de la movado. En Esperantio tia homo estis la markizo **de Beaufront**. Lia nomo estis jam en la adresaro de la jaro 1889. En 1892 li verkis la unuan lernolibron por francoj, kiu estis tre ŝatata, kaj en 1898 li aperigis propagandan gazeton por francoj, l’Espérantiste. Nun ekfloris la movado en Francio, komencĝis la **franca periodo**. Beaufront estis bonega propagandisto. Li fondis societeton por propagando de Esperanto, societeton, al kiu apartenis ĉefe francoj. Li opiniis, ke gravas gajni personojn altrangajn, kies aŭtoritato altiras pliajn adeptojn: grafo Briailles, kies infanojn li instruis, estiĝis esp-isto, same la itala grafo Galois, kiu poste iĝis membro de Lingva Komitato. Beaufront krome interesis gazetistojn, ekz. Lombard, la redaktoron de la fremdul-gazeto l’Étranger. La gazetoj ja tre influas homojn, kaj tial necesas kontaktiĝi kun redaktoroj. El la pacifistoj, kiuj pro la interna ideo jam estis fervoraj al Esperanto, oni varbis i.a. la belgan ekskapitanon Gaston Moch, kaj ankaŭ inter scienculoj oni faris sukcesan propagandon. Beaufront komprenis la valoron de aŭtoritatoj por la kreskigo de la movado kaj tial provis akiri multajn honorajn membrojn kaj aprobantojn. Tiuj ofte tre utilis al la lingvo, ekz. la anglo W. Stead, redaktoro de “Review of reviews”. Sed ĉar la aprobantoj ne sufiĉe penetris en la lingvon, ili emis al kritiko, kaj multaj fine iĝis idistoj.

Ke Esperanto rapide progresis sub la franca influo, montras statistiko pri gazetoj, literaturo, lokaj grupoj kaj pagantaj membroj. Dum ekz. en 1900 ekzistis nur 2 gazetoj – Lingvo Internacia kaj l’Espérantiste – oni havis 12 jarojn poste jam proksimume 100 gazetojn.

#### 6. Lunde, la dek-unuan de julio

S-ro B. unue traktis certajn detalojn pri fakaj kaj vesper-aranĝaj protokoloj kaj montris el Enciklopedio de Esperanto portretojn de personoj menciitaj. Poste li parolis pri unu el la francaj pioniroj, profesoro **Karlo Bourlet**, kiu estis specialisto en bicikla mekaniko kaj ĝuis grandan aŭtoritaton. Li havis influon sur la Touringklubo, kiu fariĝis subtenanta membro kaj kiel forta organizo estis de granda utilo por Esperanto. Li klopodis ankaŭ ĉe la firmao Hachette, por ke ĝi eldonu Esperantajn librojn. En 1906 li fondis tre ampleksan gazeton, La Revuo, kiun eldonis Hachette, kaj en kiu li

sub la rubriko “Babiladoj” skribis spritajn kaj satirajn artikolojn. En 1908 li fariĝis vic-prezidanto de Konstanta Komitato de Kongresoj.

**Hachette** interkonsentis en 1901 kun Zamenhof pri eldonado de Esperantaj libroj, celante monopolon pri eldonado. Beaufront tiam estis peranto kaj deklaris, ke ĉiuj aŭtoroj, kies verkoj aperu ĉe Hachette, turnu sin al li, por ke li sendu la manuskriptojn al Zamenhof kaj post korektado sciigu, kion oni devas pagi al la d-ro. Sed fakte Hachette volis, ke Beaufront korektu la presaĵojn, ĉar Zamenhof estis polo kaj tial pli fora de la franca spirito ol Beaufront. Poste aperis la tradukoj de Zamenhof ĉe Hachette kaj de aliaj aŭtoroj in “Kolekto aprobita de d-ro Zamenhof”.

Aliaj francaj pioniroj estis la neforgeseblaj profesoroj **Fruictier** kaj **Cart**. Ili volis verki grandan vortaron por francoj kaj petis Beaufront pri kunlaboro. La vortaro aperu en la eldonejo de la gazeto Lingvo Internacia, kiu nun troviĝis en Parizo. Beaufront konsentis kaj, por povi plene dediĉi sin al la nova laboro, transdonis la funkcion de peranto inter Hachette kaj Zamenhof al Bourlet. Sed nun Hachette faris proceson kontraŭ la verkantojn de la vortaro, ĉar tiuj ja ne intencis aperi ĝin ĉe Hachette. La situacio pliakriĝis, kiam Paul de Lengyel, eldonanto de Lingvo Internacia, venis de Hungario al Parizo kaj fondis kun siaj amikoj la libro-eldonan firmaon **Presa Esperantista Societo**. Tiel Hachette havis rivalon en la libro-eldonado, sed provis laŭeble konservi sian monopolon. Kvankam Hachette estis potenca firmao kaj multe kontribuis al la disvastigo de Esperanta literaturo, Zamenhof ne volis, ke ĝi sola eldonu librojn. Sian malŝaton de monopolemo esprimis Zamenhof en la 3-a punkto de la Bulonja deklaro: “Materiala mastro de la lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras.” Samtempe li ĉesigis la eldonadon de “Kolekto aprobita”.

## 7. Marde, la dek-duan de julio

Post laŭkutima kantado la preleganto unue mallonge ripetis la periodojn de la Esperanta historio kaj poste traktis la unuan kongreson en Bulonjo-sur-Mar. La demando estis, ĉu Esperanto taŭgas kiel **internacia parol-lingvo** kaj ne nur por skribaj interrilatoj. Jam en 1895 la svedo Langlet estis vojaĝinta tra la orient-eŭropaj landoj kaj konstatinta la taŭgecon de Esperanto por buŝa interkompreno. La saman konstatis ĉirkaŭ 1900 ruso kaj svedo dum vojaĝoj en Francio. En 1903 invitis la grupo Le Havre eksterlandajn esp-istojn por publikaj kunsidoj, kaj tiam venis ĉefe angloj sub gvido de s-ro Mudie kaj f-ino Lawrence. La sukceso estis granda, kaj en 1904 jam kolektiĝis proksimume 200 personoj en Calais. Estis precipe francoj kaj angloj, kiuj tie aranĝis veran feston kaj daŭrigis ĝin trans la franc-angla markolo en Dover. Oni entuziasmiĝis tiom, ke oni decidis, por la proksima jaro plivastigi la aferon je granda internacia kongreso, kaj oni komisiis advokaton Michaux el **Bulonjo** organizi ĝin.

Du gravaj demandoj estis aktualaj por la kongreso: 1) ĉu oni faru lingvajn reformojn? 2) kiel organizi la movadon? En la kanada gazeto La Lumo aperis jam en 1904 propono pri forigo de la **supersignoj**, ĉar tiuj ofte estis nepraktikaj por la preso en la tiama periodo. Post protesto de Beaufront la gazeto ĉesis aperi, kaj ĝiaj redaktoroj venis al la kongreso kun la intenco prezenti sian reformon. Sed la du eldonaj societoj PES kaj Hachette kontraŭis ĉian reformon, ĉar jam aperis multe da literaturo ĉe ili, kiu senvaloriĝus en la kazo de reformoj. Sekve oni ne traktis la reforman problemon dum la kongreso, kio utilis por la unueco de la movado, sed rezultigis malkontenton ĉe la opozicio.

Koncerne la **organizan problemon** Zamenhof projektis Centran Komitaton, kies decidoj validu nur post aprobo de la venonta kongreso, kaj plurajn fakajn Komitatojn, el kiuj unu, la Agada, estu plene memstara; tiamaniere Zamenhof pensis sekvi mezan vojon, kombinante demokration kun aŭtokratio.

Venante al la kongreso, Zamenhof ankoraŭ ne estis certa pri la sukceso. Sed la francoj bonege propagandis, kaj jam estis granda publika intereso por la kongreso. En Parizo oni prezentis lin al la urbestro kaj membroj de la Scienca Akademio, de la ministro por publika instruado li ricevis la ordenon de la Honora Legio, kaj esp-istoj eknomis lin Majstro. Profundan efikon faris la **malferma parolado**, en kiu Zamenhof i.a. diris, ke "tra la aero flugas misteraj fantomoj; la okuloj ilin ne vidas, sed la animo ilin sentas; ili estas imagoj de tempo estonta, de tempo tute nova. La fantomoj flugos en la mondon, korpigoj kaj potencoigoj, kaj niaj filoj kaj nepoj ilin vidos, ilin sentos kaj ĝuos."

La kongreson ĉeestis krom idealistoj, portantoj de la interna ideo, t.n. realistoj, kiuj nur praktike volis uzi la lingvon, t.e. profiti de Esperanto en komerco, turismo, tekniko, scienco. Ili ne volis ligi la esp-ismen al aparta ideo. Kelkaj kritikis la Preĝon sub la Verda Standardo, poemon, per kiu Zamenhof finis sian paroladon, kaj ili diris, ke Zamenhof tiel kvazaŭ enkondukis novan religion. Por ke ne estiĝu miskompreno pri la signifo de la vortoj esperantismo kaj esperantisto, la kongresanaro akceptis la t.n. **Bulonjan deklaron**, en kiu 5 gravaj demandoj estis respondataj:

1) kio estas esperantismo?

la penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa;

2) kial Esperanto?

ĉar lingvo internacia nur povas esti arta, kaj el ĉiuj artlingvoj Esperanto estas ĉiuflanke elprovita kaj plej taŭga;

- 3) kiu estas mastro?                      materiala mastro estas la tuta mondo, spiritaj mastroj estas la plej bonaj verkistoj;
- 4) kio estas la Fundamento?                      verketo neŝanĝebla kiel bazo de la evoluo;
- 5) kio estas esperantisto?                      ĉiu kiu uzas la lingvon, tutegale por kiaj celoj.

#### 8. Merkrede, la dek-trian de julio

Kiel kutime ni unue kantis. . S-ro B. poste daŭrigis la traktadon de la internaciaj kongresoj. En Bulonjo oni parte efektivigis la organizan projekton de Zamenhof, elektante lingvan kaj organizan komitatojn. Ambaŭ komitatoj estis nur provizoraj, sed fariĝis definitivaj dum la unua kongreso; tiam la Organiza Komitato ricevis la nomon Konstanta Komitato de Kongresoj. La Lingva Komitato havis komence 95 membrojn el 28 nacioj, el kiuj la franca, angla, rusa kaj itala estis plej bone reprezentataj. Prezidanto fariĝis la franca rektoro **Boirac**, kiu poste ludis tre gravan rolon dum la Ido-skismo, defendante bonege Esperanton kontraŭ la atakojn de la id-istoj kaj konservante laŭeble la unuecon inter la esp-istoj.

La 2-a kongreso okazis 1906 en Ĝenevo, kaj tie oni decidis, ke Esperanto estu ĉiam la sola lingvo por la kongresaj kunsidoj.

Okaze de la 4-a kongreso en Dresdeno 1908 la ĵus fondita mondorganizo **Universala Esperanto-Asocio** (UEA) havis sian unuan kunsidon.

La unua kongreso ekster Eŭropo estis 1910 en Vaŝingtono (Usono).

En Krakovo 1912 oni festis la 25-an jubileon de la linvo. Zamenhof faris tiam sian lastan kongres-paroladon kaj rezignis pri la plua gvido de la movado. En Bern 1913 li lastfoje partoprenis universalan kongreson.

La 10-a kongreso estis okazonta en Parizo, sed ne povis okazi pro eksplodo de la mondmilito. Antaŭ la fino de la milito, la 14-an de aprilo 1917, mortis d-ro Zamenhof, estante nur 57 jarojn aĝa.

Dum la milito ne eblis aranĝi kongresojn, kaj la Esperanto-movado suferis multe.

Sed post la milito ĝi refortiĝis, kaj ek de 1920 plue okazis kongresoj. Menciindaj estas la kongreso de Helsinko 1922, kie oni stabiligis la rilatojn inter UEA kaj la landaj organizoj, kaj la kongreso de Kolonjo 1933, kie oni aligis ĉiujn landajn asociojn al la mond-organizo.



Plej bone vizitataj estis antaŭ la milito tiu de Nürnberg 1923, ĉi-lasta de proksime 4000 partoprenantoj.

Komparante la diversajn kongresojn, oni konstatas, ke la nombro de la reprezentataj landoj varias inter 16 kaj 43. Ĉiam la nombro de la partoprenantoj estas pli malgranda ol tiu de la aliĝintoj. Por la unua kongreso ekz. anoncis sin ĉirkaŭ 700 personoj el 20 landoj, sed fakte partoprenis nur 600.

#### 9. Ĵaude, la dek-kvaran de julio

La leciono komenciĝis per kantado.

La preleganto unue parolis pri UEA, t.e. Universala Esperanto-Asocio, kiun fondis en 1908 la sviso **Hektor Hodler**. Tiu ĉi viro volis utiligi Esperanton por la praktika vivo kaj tial kreis mond-organizon kun delegitoj en ĉiuj gravaj lokoj. La delegitoj havas la taskon, doni informojn kaj helpon al vojaĝantaj kaj komercantaj membroj de la asocio. Dank' al Hodler la organizo transvivis la mondmiliton, kaj dum la milito ĝi helpis interŝanĝi monon kaj leterojn inter malamikaj landoj; ĝi ankaŭ helpis trovi malaperintojn. Ne nur fortojn, ankaŭ monon Hodler oferis por la movado, ĉar mortante en 1920 li testamentis al UEA grandan sumon, per kiu oni post la milito faris grandstilan propagandon. Sed propagando kaj administrado estis tro multekostaj, kaj fine oni konstatis okaze de la Stokholma kongreso 1934, ke restas neniom de la donacita kapitalo. Por malpliigi la elspezojn, oni transigis la sidejon de Ĝenevo al Londono. Ĉar ne ĉiuj (precipe svisoj) konsentis pri tio, estiĝis skismo. En 1936 fondiĝis IEL, t.e. **Internacia Esperanto-Ligo**, sub la prezido de la eksiĝinta UEA-estraro (prezidanto: generalo Bastien). IEL kreskis rapide, ĉar aliĝis la plej multaj landaj organizoj. La unua kongreso de la nova mond-organizo okazis 1937 en Varsovio, la urbo de Zamenhof, ĉar oni volis festi tie la 50-jaran jubileon de la lingvo.

Ali-speca skismo okazis jam du jardekojn antaŭe, skismo ne organiza, sed lingva. En 1907 la Internacia Asocio de Akademioj deklaris sin nekompetenta pri elekto de artefarita lingvo, kaj tiun taskon transprenis komitato de la Delegacio por Alprenado de Lingvo Internacia. Al la komitato apartenis scienculoj diverslandaj, i.a. la francoj **Couturat** kaj **Leau**, la germano Ostwald, la dano Jespersen kaj la ruso Baudouin de Courtenay. La komitato ekzamenis la diversajn projektojn de artefarita lingvo kaj fine akceptis la projekton Ido, kreitan de Beaufront sub la unfluo de Couturat. Beaufront, la iama propagandisto de Esperanto, longe ludis duoblan rolon, ĉar li havis la komision defendi Esperanton antaŭ la komitato, sed fine, en majo 1908, li "levis la maskon". Kelkaj esp-istoj sekvis al Beaufront kaj Couturat, aliĝante al la asocio "Uniono di l'amiki de la lingvo internacia", entute proksimume 20% de la

gvidantoj kaj nur 4% de la cetera anaro. Unu el la unuaj idistoj, la dana lingvisto **Jespersen**, fine forlasis la Ido-movadon kaj kreis novan artefaritan lingvon, Novial. Esperanto venke transpasis la Ido-krizon pri sia pli firma fundamento kaj la pli bona disciplino de la adeptoj.

#### 10. Vendrede, la dek-kvinan de julio

Dum la lasta leciono historia la instruisto parolis pri la **laborista esperantismo**. Jam antaŭ la milito fondiĝis laboristaj Esperanto-grupoj, ekz. en Parizo, Stokholmo kaj Hamburgo. Ankaŭ land-organizoj ekzistis jam en tiu periodo, unue en Britio; plej forta estis la germana. Frue ekestis ankaŭ aparta literaturo, sed antaŭ la milito oni ankoraŭ ne verkis originale. I.a. oni tradukis la unuan volumon de la romanaro “La mizeruloj” de Victor Hugo.

Post la milito refondiĝis la internacia organizo Liberiga Stelo, kiu 1921 en Praĥa ricevis la nomon SAT, t.e. **Sennacieca Asocio Tutmonda**.

La sennaciismo estas soci-politika teorio, starigita de la franca instruisto E. **Lanti**. Laŭ ĝi oni celu unuecan mondkulturon pere de Esperanto, kulturon sen iuj naciaj apartaĵoj. Tamen la sennaciismo ne estas oficiala teorio de SAT, oficiala ĝi estas nur por la sennaciista frakcio interne de SAT. La ĉefa rilato inter SAT kaj sennaciismo montriĝas en tio, ke SAT laŭ sia strukturo estas sennacieca. Tio signifas, ke SAT ne konsistas el landaj organizoj, sed estas internacia organizo ekster la landaj asocioj. Ĝi havas do esence la saman strukturon kiel UEA ĝis la interkonsento de Kolonjo.

En la **literaturo** de SAT respeguliĝas la tendencoj de la laborista klaso, la marksista (Marx-Engels: Komunista Manifesto – Lenin: Ŝtato kaj Revolucio) kaj anarkista – sennaciista (Tolstoj: Kristanismo kaj Patriotismo). Krome SAT aperigis laborist-tendencan beletristikon (Sinclair: Jimmy Higgins), filozofian literaturon (Kropotkin: Etiko) kaj originalaĵojn el diversaj sciencoj (ekz. Neergaard: Pri heredo kaj raso). Speciale rimarkindaj estas la originalaĵoj de Lanti (For la neŭtralismo – La laborista esp-ismo – Naciismo). La plej grava lingvo-sciencia verko eldonita de SAT estas Plena Vortaro (aŭtoro: Grosjean-Maupin).

Jam en 1923 la komunistaj SAT-anoj provis aligi SAT al la Tria Internacio, sed malsukcesis. SAT restis neŭtrala rilate politikajn partiojn. Fine en 1932 la komunistoj kreis propran organizon, **Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)**, kiu en si unuigas ĉiujn landajn organizojn kun komunisto tendenco kaj do ne havas sennaciecan strukturon. La plej forta branĉo de IPE estas la rusa asocio SEU (Sovetlanda Esp-ista Unuiĝo).

Pro la venko de la **naci-socialismo** SAT perdis ankaŭ siajn membrojn en Germanio, kaj en 1936 likvidiĝis eĉ la neŭtrala organizo germana...

Inter la **landaj organizoj** aŭ LEA-oj (Laboristaj Esperanto-Asocioj) estas nun plej forta la nederlanda FLE (Federacio de Laboristaj Esp-istoj) kun ĉirkaŭ 5000 membroj. Entute Holando estas bona tereno por la esp-ismo; i.a. nun estas en Scheveningen la redakcio de la neŭtrala gazeto Heroldo, en Hago la Internacia Cseh-Instituto kaj en Arnhem la Esperanto-Domo.

Fine la instruisto menciis la SAT-kongreson en **Gotenburgo** 1928, kie ordiĝis la rilatoj inter SAT kaj la naciaj federacioj: SAT praktikas, kaj la land-organizoj zorgas pri propagando kaj instruado.

### III. LITERATURO

(Protokolintoj: Anna Dahlgren, Anna-Lisa Edenburg)

#### 1. Lunde, la kvaran de julio

La leciono komenciĝis per la kanto "Mariston logas vasta mar".

Poste s-ro M. rakontis pri literaturo legita de li en la komenca studo de Esperanto. I.a. li legis antologiojn, la gazeton "Esperanto Triomfonta" kaj la revuo **Literatura Mondo**, kiun li ŝategas pro Baghy kaj Kalocsay. La libron "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat li trifoje legis. Por novaj esperantistoj li rekomendis la verkojn de la sveda aŭtoro Stellan Engholm, speciale la romanon "Al Torento".

Poste ĉiu kursano rakontis pri legita literaturo.

#### 2. Marde, la kvinan de julio

Esperanto valoras ne nur kiel internacia helplingvo, sed ankaŭ per sia literaturo. Esperanto estas lingvo por kaj tekniko kaj sento. Ĝia **spirita bazo** estas interpopola amo.

Laŭ la oficiala statistiko la Esperanta literaturo havas pli ol 5000 volumojn. Tiun ampleksan literaturon oni povas **klasifiki** je originalaĵoj kaj tradukoj, kaj ambaŭ specoj povas prezentiĝi kiel prozo aŭ poezio. La originalaĵojn oni subdividas je bel-literaturo, prilingvaj verkoj, sciencaj verkoj (tekniko, religio k.a.), historiaj verkoj kaj biografioj. Kronologie oni povas diferencigi la antaŭmilitan literaturon de la

postmilita kaj subdividi la tempon antaŭ la milito en la klasikan periodon de la komenco kaj la internacian periodon de la tutmondaj kongresoj kaj propagando. La postmilita literaturo estas pli grava ol la antaŭa.

La unua, kiu verkis en Esperanto, kompreneble estis **Zamenhof**. Liaj **prilingvaj artikoloj** estas kolektitaj en **Lingvaj Respondoj**, el kiuj s-ro M. citis kelkajn frazojn; oni vidas, ke Zamenhof estis tolerema rilate la lingvon. Grava prilingva verko de Zamenhof estas ankaŭ **Fundamento de Esperanto**, aperinta en 1905 kaj enhavanta gramatikon, ekzercaron kaj la Universalan Vortaron.

Pleje la Zamenhofa verkaro konsistas el **tradukoj**, el kiuj gravas **Hamleto** (de Shakespeare), **Ifigenio en Taŭrido** (de Goethe) kaj **Fabeloj** (de Andersen), ĉiuj 3 tradukitaj el la germana lingvo.

### 3. Merkrede, la sesan de julio

Ripetinte iom el la lasta leciono, s-ro M. daŭrigis paroli pri Zamenhof kiel tradukanto. Krom la tradukoj jam menciitaj gravas **La rabistoj** (de Schiller), **Marta** (de Orzeszko) kaj **La revizoro** (de Gogol), tradukitaj el resp. la germana, pola kaj rusa lingvoj.

Zamenhof ankaŭ tradukis la **Malnovan Testamenton**, do la unuan kaj pli grandan parton de la Biblio, kiu por ĉiam restas unika fonto de la kulturhistorio. Tiun gigantan laboron li povis fini nur en la lastaj jaroj de sia vivo.

Zamenhof estis tre bona **lingvisto**. Krom la pola kaj hebrea li bone regis ankaŭ la rusan, germanan, anglan, francan, latinan kaj grekajn lingvojn. Tre laborema li estis; precipe en 1908 li pretigis multajn tradukojn. Tiel produktiva li povis esti, ĉar li laboris laŭ fiksa plano. Fine tamen kormalsano malpliigis lian laborforton.

La plej modela Esperanto troviĝas en liaj **kongres-paroladoj**. En ili li kvazaŭ profeto antaŭdiris tion, kio okazu dum la venontaj jaroj inter la esperantistaro; li tiamaniere faris trijaran, eĉ sesjaran planon por la fareda laboro.

D-ro **Dietterle** eldonis la Originalan Verkaron de Zamenhof, en kiu libro oni ankaŭ povas trovi la kongresajn paroladojn; krome ĝi enhavas antaŭparolojn, gazetartikolojn, traktaĵojn, leterojn kaj poemojn de nia majstro.

S-ro M. diris, ke li antaŭe, en aliaj kursoj, multe parolis pri la verkistoj, sed ke nun ŝajnas al li pli bone, lasi paroli la verkistojn mem. Sekve li laŭtlegis iom el la unua kongres-parolado kaj aldone diris kelkajn vortojn pri la **interna ideo**, sen ke la hodiaŭa Esperanto-movado ne ekzistus.

Gravegaj por la lingvo estas du libroj, la Fundamento de Esperanto kaj la **Fundamenta Krestomatio**, ĉi-lastaj kolektoj da originalaĵoj kaj tradukoj de Zamenhof kaj aliaj pioniroj el la klasika periodo.

Zamenhof ĉiam estis tre modesta. I.a. li diris, ke la lingvo ne apartenas al li, sed ke ĝi estas propraĵo de ĉiuj, li nur estas iniciatoro. Laŭ tio la **evoluo de la lingvo** estas **demokrata**, ĝi iras nome de malsupre supren. Se la poetoj aŭ aliaj verkistoj uzas novan vorton, la **Lingva Akademio** ekzamenas, ĉu ĝi trovas aprobon ĉe la esperantistoj kaj nur en tiu ĉi kazo oficialigas ĝin.

Fine de la leciono s-ro M. citis kaj analizis tre bele la poemon "La kapelo", verkitan de Uhland kaj tradukitan de Zamenhof.

#### 4. Ĵaŭde, la sepan de julio

La temo estis: **Zamenhof kiel poeto**.

La originalajn poemojn de Zamenhof oni povas dividi en 4 grupojn. La unuan grupon karakterizas ampleksa ĝeneraleco: **Espero** kaj **Preĝo sub la verda standardo**. La poemoj de la dua grupo estas dediĉitaj al la kunlaborantoj kaj propagandistoj: **La vojo** kaj **Al la fratoj**. Tute personecaj estas **Mia penso** (la unua Esperanta poemo), **Ho, mia kor'** kaj **Pluvo**, apartenantaj al la tria grupo. La kvara grupo enhavas du poemojn porcelajn sen ĝenerala valoro, nome "Al la Esperantisto" kaj "Saluto al verda radio".

Zamenhof estis idealisto unuaranga. **Li respektis sian verkon pli ol sin mem**.

Ni ekzercadis iom en laŭtleĝo de poemoj kaj poste aŭdis la Himnon kaj "Tagiĝo" pere de gramofono.

Pri la **Himno ni eksciis**, ke ĝian muzikon faris la franca barono Ménil. Kelkaj kritikis la Himnon, dirante, ke la melodio ne estas bona, dum al aliaj ŝajnas, ke la vortoj ne taŭgas. Nu, ni povus ricevi alian himnon eble pli bonan, sed La Espero estas tamen la unua, kaj ĝi estos ĉiam por ni la plej kara. La mondo nun estas tre griza kaj malbona, sed tra la nuboj tamen briletas la verda stelo.

D-ro Zamenhof **ne nur predikis** la interhoman amon, li ankaŭ mem vivis laŭ ĝi. Jen karakteriza fakto: Servistino de Zamenhof montris lian portreton al d-ro Privat, dirante, ke ŝia mastro neniam pekis.

## 5. Vendrede, la okan de julio

Per la kanto “Nigra Rudolfo” la leciono komenciĝis.

Temo estis la **klasika periodo** de Esperanto.

En la unuaj du jaroj aperis 29 volumetoj, inter ili La neĝa blovado de Puŝkin (1888) kaj **La gefratoj** de Goethe (1889), ambaŭ tradukitaj de A. Grabowski.

**Grabowski** estis la unua esperantisto, kiu parolis Esperante kun Zamenhof. Li estis inĝeniero kaj vivis en Varsovio, kiam eksplodis la mondmilito. Hejmenveninte li trovis sian domon malplena, ĉar liaj familianoj devis formigri Ruslandon. Li nun ofte vizitis Zamenhof, sed tiu mortis jam en 1917. Malgraŭ soleco kaj mizero li ankoraŭ sukcesis traduki la polan epopeon **Sinjoro Tadeo**. Ĝia aŭtoro estis la fama poeto **Mickiewicz**, tipa reprezentanto de la pola liberemo; lia altnivela arto impresis multe al Zamenhof kaj Grabowski. La traduko de “Sinjoro Tadeo” estis la plej granda faro de Grabowski, sed ankaŭ lia lasta.

Grabowski unue volis reformi Esperanton, sed poste li restis tute fidela al la lingvo. Li plene vivis en Esperanto, kaj kvankam li kiel Zamenhof suferis pro kor-malsano, li tamen seninterrompe laboris ĝis sia morto en 1921. Unika estis tiu morto: ĝoje rigardante antaŭ montro-fenestro elmetitajn librojn de Esperanta libro-vendejo, li finis sian vivon pro subita kor-atako.

El la multaj tradukoj de Grabowski ni notu ankoraŭ jenajn: **Halka** (opero) de Wolski, **Mazepa** (tragedio) de Slowacki, **El parnaso de popoloj** (traduko de poemoj el 30 lingvoj).

La **stilo** de Grabowski montriĝas en **onomatopeo** aŭ son-pentro, **aliteracio** aŭ liter-ripeto, **asonanco** aŭ vokal-ripeto (ekz. “kaj tra tolo ĉe kolo ĝi tranĉas laŭ volo”), **verbigo** de substantivoj kaj adjektivoj (ekz. “tempas manĝi”), **vortŝparo** (ekz. “inter ĉi kampoj”) kaj forlaso de la radiko **est-** (ekz. ‘as = estas – laŭdatu = estu laŭdata). Grabowski flugis iomete tro supren lingve. Tamen liaj stilaj rimedoj pleje estas tute aktualaj, i.a. ankaŭ la limigita uzo de la sufikso –ad.

La polaj esperantistoj metis en 1933 **memortabulon** honore al Grabowski je la domo ĉe strato Hoza 42 kun jena teksto: En tiu ĉi domo loĝis inĝeniero Antoni Grabowski, senlaca pioniro de la ideo de la lingvo internacia, genia tradukinto de “Sinjoro Tadeo” kaj de aliaj ĉefverkoj de pola literaturo je Esperanto. VI Tutpola Kongreso de Esp-istoj, Warszawa 5 VI 1933.

Memore al Grabowski ni komune kantis “Tagiĝo”.

Tria pola verkisto estis d-ro Kazimierz Bein, nomita **Kabe**. Oni povas nomi Zamenhof patro de Esperanto, Grabowski patro de la Esperanta poezio kaj Kabe patro de la Esperanta prozo. Pri la stilo de Kabe oni povas diri, ke ĝi estas pli Zamenhofa ol tiu de Zamenhof.

Lia unua traduko estis **La fundo de l' mizero** de Sieroszewski (1904), lia lasta verko **Vortaro de Esperanto** (1910), vortaro kun difinoj en Esperanto, do antaŭanto de Plena Vortaro. Tiu ĉi Esp-a vortaro kune kun la traduko de **La faraono** de Prus (1907 – 1908) estas liaj ĉefverkoj.

Kabe tro laboris por Esperanto kaj bedaŭrinde forlasis ĝin en 1911; de tiam li tute ne okupas sin pri Esperanto. S-ro M. rakontis, ke li okaze de sia restado en Varsovio (1937) telefonis al Kabe, kaj tiam tiu respondis, ke li de 30 jaroj ne okupas sin pri Esperanto; li ne plu volis paroli. Tamen li fine invitis s-ron M. kaj tre afable akceptis lin, parolante Esperanton dum 1½ horo. Sed la Varsovian kongreson li ne volis partopreni.

Fine s-ro M. citis el “Rimportretoj” pri Kabe.

#### 6. Lunde, la dek-unuan de julio

Post mallonga ripeto koncerne la jam traktitan parton en la literatura fako s-ro M. laŭtlegis la antaŭparolon al “La faraono” kaj rakontis iom el la enhavo de la libro. Pri lia vizito al Kabe li aldonis, ke tiu laŭ propra aserto forgesis Esperanton. Tamen li ja konversaciis kun li en Esperanto kaj konfesis, ke li eĉ legas iom de Esperanta literaturo. Sed li ŝajnis esti pesimista pro la tro malrapida progreso – eĉ regreso – de nia movado.

S-ro M. poste parolis pri la **antologioj**, la perloj de nia literaturo. Antologio estas kolekto da tradukoj el la literaturo de iu popolo. La unua aperinta estas la **kataluna**, kiu restis modela por ĉiuj postaj antologioj. Treege valora estas la **hungara**, en kiu kunlaboris tiaj eminentuloj kiel Kalocsay kaj Baghy kaj en kiu i.a. estas verko de la granda hungara poeto **Petöfi**. Tre bona antologio estas ankaŭ la **sveda**. Ĝia bona aspekto akordas al ĝia bona enhavo. Krome ni havas **belgan, bulgaran, ĉeĥoslovak** kaj **estonan** antologiojn. En la laste nomita kunlaboris i.a. la fama verkistino **Hilda Dresden**. Per la antologioj la literaturo de malgrandaj nacioj konatiĝas al internacia legantaro.

## 7. Marde, la dek-duan de julio

Unue s-ro M. per kelkaj ciferoj montris al ni la **evoluon de la Esperanta literaturo**. La nombro de la volumoj estis 42 en 1891, 211 en 1904 kaj 1330 en 1909; nun oni povas kalkuli pli ol 5000 volumojn.

La du plej gravaj dum- kaj post-militaj verkistoj estas **Julio Baghy** kaj **Kolomano Kalocsay**. Ili ambaŭ estas hungaroj, naskiĝis en la sama jaro 1891 kaj ankaŭ esperantiĝis en la sama jaro, nome 1911. La patro de Baghy estis aktoro, same li mem ĝis la mondmilito. Li milit-servis en la aŭstro-hungara armeo kaj post kelkaj monatoj falis en la rusan kaptitecon. Oni transportis lin en Siberion, kie li restis ĝis la fino de la mondmilito. Ĉar en la internacia kaptitejo estis tre malfacile interkompreniĝi, la kampo estis tre bona por Esperanto. Do Baghy gvidis Esperantajn kursojn kaj havis multe da lernantoj. Oni eĉ aperigis propran gazeton, kaj en ĝi estis la unuaj poemoj de Baghy. Oni povas diri, ke tiu **Siberia militkaptitejo estis la lulilo de la originala poezio Esperanta**.

En la verkoj de Baghy gravas la romanoj **Viktimoj** (1926), **Hura** (1930) kaj **Sur sanga tero** (1935), krome la poemaro **Preter la vivo** kaj la novelaro **Verdaj Donkiĥotoj**.

La devizo de Baghy estas: Amo kreas pacon, paco konservas homecon, homeco estas la plej alta idealismo.

Fine s-ro M. laŭtlegis tre belan poemon de Baghy, nome "Ivanĉjo" kaj menciis, ke Baghy ne nur verkis originale, sed ankaŭ tradukis el la germana, hungara kaj eĉ ĉina lingvoj.\*

*\*) Baghy neniam tradukis el la ĉina ktp. lingvoj, sed liaj Esp. verkoj aperis ankaŭ en hungara, germana kaj ĉina tradukoj.*

*/Tiberio Morariu*

Baghy kaj Kalocsay bone kompletigas unu la alian. La verkoj de ambaŭ havas kvaliton kaj influon sur la junajn poetojn sam- kaj alilandajn, kaj ambaŭ verkas abunde.

Kalocsay estas ĉefkuracisto. Lia unua poemo estis **Sonorila ludo** kaj aperis en 1921. Tamen la vera debuto de Kalocsay okazis nur 1922 en la kongreso de Helsinki. Tie li, inspirita de la finnlanda nacia epopeo "Kalevala", deklaris la unuan fojon la nesupereblan salut-poemon "Kongresa runo".



8. Merkrede, la dek-trian de julio

Krom la jam menciitaj verkoj de Kalocsay estas rimarkindaj lia **Kantanta kamparo** kaj liaj tradukoj **Johano la brava** (popolepopeo) de Petöfi kaj **La tragedio de l' homo** de Madach. Grandioza estas la traduko de **Infero** de Dante el la mezepoka itala lingvo, sed eble la traduko estas iom tro moderna. La poemaro **Eterna bukedo** estas kolekto da tradukoj el 22 lingvoj. El ĝi s-ro M. laŭtlegis 3 belegajn poemojn.

D-ro Kalocsay ne nur estas poeto, li ankaŭ estas tre sperta **lingvisto**. Li aperigis konsilojn por poetoj-komencantoj en **Parnasa gvidlibro** kaj traktis lingvajn problemojn en **Lingvo, stilo, formo**, poste tre detale en **Plena gramatiko**.

9. Vendrede, la dek-kvinan de julio

En tiu ĉi leciono s-ro M. parolis unue pri **Jean Forge**, kies vera nomo estas Jan Fethke. Li estas polo, naskiĝis 1903 kaj esperantiĝis 1919. Jam 1923 aperis lia originala romano **Abismoj**, kiun oni tradukis en la finnan kaj ĉinan lingvojn. Liaj postaj romanoj estas **Saltego trans jarmiloj** kaj **Mr. Tot aĉetas mil okulojn**.

Jean Forge estas film-reĝisoro, kaj lia profesio influis multe lian verkadon. Liaj verkoj montras klaran stilon, psikologion kaj fundamentan lingvon. Sed la kritiko diras, ke ne estas celo en lia verkado, li ne edukas homojn per siaj libroj. Tre streĉaj estas la libroj, kaj estas bone, ke ankaŭ tiu speco enestas nian literaturon.

S-ro M. rakontis pri la esperantistiĝo de Forge. Trovinte Esperantan gramatikon sur libro-breto de sia patro, li kun siaj du fratoj ekstudis la lingvon. Baldaŭ la severan aspekton de la patra (kuracista) hejmo ŝanĝis Esperanta manpresejo. La kuracistan akceptejon la junuloj aranĝis kiel konstantan ekspozicion. Poste Jean komencis korespondi kaj havis "nur" 30 korespondantinojn. Fine li presigis siajn amleterojn. Pere de Esperanto li ricevis profesion kiel film-reĝisoro ĉe UFA en Berlino.

**Raymond Schwarz** estas franco, kaj en liaj verkoj oni povas rimarki la speciale gajan Parizan atmosferon kaj la tipe francan spiriton. Li estas majstro de la Esperantaj **vortludoj**. Liaj ĉefverkoj estas la poemaro **Verdkata testamento**, la novelaroj **Prozo ridetanta** kaj **La stranga butiko**, la romano **Anni kaj Montmartre**. En sia monata revuo **La pirato** li kritikis kaj primokas troigojn kaj mankojn en la Esperanta movado. Li rigardas la mondon tra optimistaj okulvitroj.

La sviso **Edmond Privat** estas eminentulo en kaj historio kaj literaturo. Multege li faris por la Esperanta movado. Li estis prezidanto de UEA kaj ICK (Internacia Centra

Komitato) kaj redaktoro de la UEA-organo "Esperanto". En la Esperantaj kongresoj li brilis kiel perfekta oratoro. Ĉe la Internacia Labor-Oficejo li atingis, ke Esperanto estis agnoskata kiel klara lingvo por la telegrafio, do kiel lingvo egalrajta al aliaj lingvoj. (Se Esperanto restus koda lingvo, oni devus pagi telegramon laŭ nombro de la literoj, sed nun oni nur bezonas pagi laŭ nombro de la vortoj.)

Edmond Privat verkis la faman **Historio de la lingvo Esperanto kaj Vivo de Zamenhof**, kiuj ambaŭ estas la plej gravaj fontoj pri la historio de nia movado; krome li verkis la dramon **Ginevra** kaj la lingvo-sciencan libron **Esprimo de sentoj en Esperanto**.

#### IV. GRAMATIKO

(Protokolinto: Siri Bergström)

##### 1. Marde, la kvinan de aŭgusto

S-ro Morariu instruis pri la **participaj finaĵoj** –anta, -inta, -onta.

Redonante korektitajn skrib-taskojn en la vespero, s-ro Gerdman atentigis pri jenaj lingvaĵoj:

Frazo en **nerekta parolo** devas havi la saman tempon, kiun ĝi havas en rekta parolo. **Tempaj prepozicioj** estas dum por daŭro, en por temp-ero; en dubaj kazoj oni uzu je.

Oni ne miksu sole (signifo: endast) kun sola (signifo: ensam).

Oni traduku la svedan *av* per el, se oni volas esprimi elekton, kaj per de, se temas pri genitivo.

La sveda *då* kiel tempa konjunkcio estas kiam, kiel kaŭza konjunkcio do kaj kiel adverbo tiam.

La tradukon de "en sådan intressant bok" oni povas nuanci jene: kiu interesa libro, kiel interesa libro, kiom interesa libro.

La sveda verbo *sakna* = senti la perdon de, dum *fattas* = manki.

Estas diversaj manieroj, por esprimi la svedan frazon *jag meddelade honom det*: mi sciigis lin pri tio, mi sciigis tion al li.

Sinonimaj esprimoj pri *folk* estas nacio, popolo, homoj, oni.

La diferenco inter *mâste* kaj *behöva*: vi devas fari tion = du maste göra det; vi ne devas fari tion = du behöver inte göra det; vi devas ne fari tion = du får inte göra det.

## 2. Merkrede, la sesan de julio

S-ro Nylén enkondukis per sondado kaj indiko al lingvaj konstruoj kaj devenoj. Speciale li pritraktis **konkretajn** kaj **abstraktajn** vortojn.

La **konstruo** de nia lingvo estas la plej regula dank' al la genia vortfarado kaj pro la tre facila kaj logika gramatiko. La **vortoj** de Esperanto estas 3-specaj, nome radik-vortoj, afiksoj kaj gramatikaj finaĵoj, kaj Esperanta vorto estas ĝenerale pli enhava ol ĝia naci-lingva traduko.

Tre klare s-ro Nylén fine traktis la ĝustan **elparolon** de la Esperantaj literoj; ĉefregulo por korekta elparolo de la vokaloj estas: **ĉiam meze!**

## 3. Ĵaŭde, la sepan de julio

S-ro Morariu daŭrigis sian instruon pri la participoj. Unue li donis ekzemplojn pri la uzo de la **adverbaj participoj**. Ili estas uzataj, kiam unu persono sam- aŭ divers-tempe plenumas du agojn. Poste li klarigis la diferencon inter **aktivaj** kaj **pasivaj** participoj. Li rekomendis al ni, en la instruado komenci per la pasivaj participoj, ĉar laŭ liaj spertoj tiuj ŝajnas al la lernantoj esti pli facilaj.

## 4. Ĵaŭde, la dek-kvaran de julio

Unue s-ro Nylén resumis sian antaŭan lecionon pri la elparolo.

Venis nun kelkaj vortoj pri la **akcento**. La svedaj vortoj havas melodion kaj diferencajn akcentojn. En Esperanto oni havas nur unu akcenton.

Simpla regulo estas, ke oni iom longigas la vokalon en **malfermitaj silaboj** (t.e. silaboj finiĝantaj per vokalo), kion oni ne faras en fermitaj; laŭ tio la sono a en ka-to estas iomete pli longa ol en kan-to.

En **kunmetaĵoj** oni povas rimarki malgrandan "ekĝemon" inter la eroj; ekzemploj: nuk'sako, nuks'kerno

**Sinsekvajn vortojn** oni povas elparoli kune (en “la homo” la artikolo estas elparolata kune kun ĉefvorto), kun iomete da interspaco (ekz. “de homo”) aŭ ankoraŭ pli dise (ekz. “ne home” kun akcentita ne).

Koncerne la **ĥ-sonon** atentigis nin s-ro N., ke ĝi mankas en multaj lingvoj, kaj tiel oni ofte ankaŭ en Esperanto diras monarko anstataŭ monarĥo, arkivo anstataŭ arĥivo ktp.

Pri **vortfarado**: Vorto estas aro da sonoj aŭ literoj, kiuj kune reprezentas signifon. En Esperanto eĉ la finaĵoj estas vortoj, ekz. –o = io, kio estas (objekto aŭ persono), –i = fari agon. Laŭ tio gast-i = fari la gast-agon, agi kiel gasto, esti gasto, dume gast-ig-i = igi iun gasto, fari la gast-agon, esti gastiganto al iu. Iu, kiu volas esti gasto, estas gast-em-a, sed tiu, kiu volas havi gaston, estas gast-ig-em-a (jen gast-am-a ne estas sufiĉe klara). La sufikson –em oni povas forlasi, se ne temas pri kutimo; ekz. li estas danka signifas, ke li dankas, dume li estas dankema signifas, ke li havas la kutimon ĉiam danki.

Malbona frazo estas li parolis la lingvon fluante, prefere oni diru li flue parolis la lingvon (t.e. lia parolo kutime estis flua). Oni ankaŭ observi la diferencon inter preterflugante aŭdi ion (iu devus flugi!) kaj preterfluge aŭdi ion (i förbifarten).

Oni rajtas fari verbojn ankaŭ el adjektivoj, ekz. li ne fortas levi la ŝtonon. Pri tiu rajto oni dum certa tempo polemikis. (Beaufront kontraŭis.)

Ofte oni intermiksas –foje kaj –oble; två gånger = dufoje, två gånger tre = duoble tri.

Iom pri la **naturu de la sufiksoj**; filino ≠ filo, kiu estas ino, t.e. –ino kolorigas la signifon, tiel ke la vorto transiras signifolimon.

La fundamenta signifo de la prefikso ge- estas “ambaŭ-seksa paro”, ekz. en la vorto geedzoj. Sed nun ge- kunligas ankaŭ personojn sen konsidero de la pareco: anstataŭ sinjorinoj kaj sinjoroj oni nun diras gesinjoroj ktp.

## ALDONOJ

### 1. La sufiksoj -ig kaj -iĝ

**La sufikso -ig faras netransan verbon transa** kaj signifas: förmå att, komma att, göra till. Ekzemploj: la instruisto parolas = läraren talas – la instruisto paroligas la lernanton = läraren förmår eleven att tala; la amiko venis = vännen kom – oni venigis la amikon = man förmådde vännen att komma, hämtade vännen; la infano nun dormas, ĉar la patrino dormigis ĝin = ... ty modern har sövt det; mi nigrigis mian helan robon; la soldato mortis, ĉar la malamiko mortigis lin.

**La sufikso -iĝ faras transan verban netransa** kaj signifas: övergå till, bliva.

Ekzemploj: la malsanulo vekiĝis, ĉar la doloro vekis lin = den sjuke vaknade, ty smärtan väckte honom; mi surpriziĝis, ĉar lia konfeso surprizis min. La sufikso -iĝ ĉiam montras ŝanĝon en novan staton, kaj **ĝia origina signifo estas la sveda finaĵo -na**, ekz. : ruĝiĝi = rodna, bli röd; la horizonto ruĝiĝas, ĉar la sunsubiro ruĝigas ĝin; mi malsaniĝis, ĉar la malsato malsanigis min; heliĝi = ljusna; tagiĝi = dagas, bli dag.

**La iĝ-verboj samkiel la ceteraj netransaj verboj neniam ekhavu pasivan formon.**

**Ne trouzu la iĝ-sufikson**, ĉar ĝi respondas nek la resendan nek la pasivan formon de la verbo en la naciaj lingvoj; ĝia signifo estas trovebla inter tiuj du. Komparu:

- 1) mi ĵetas min = jag kastar mig: resenda verbo, kiu montras ke la subjekto mem resendadas la agon sur sin;
- 2) la ŝtono estas ĵetata de la knabo = stenen kastas av pojken: transa verbo en pasiva formo, kiu montras ke la knabo faras la agon (estas aganto);
- 3) mi ĵetiĝas = jag kastas: montras la originan signifon de la sufikso -iĝ kaj tute ne klarigas, kiu aŭ kio faras la agon.

Same pri oni fariĝas maljuna = man blir gammal: -iĝ-verbo kiu ne montras aganton; oni faras sin amata per boneco = man gör sig omtyckte genom godhet: resenda verbo, kiu montras ke la subjekto resendadas la agon sur sin mem; la tablo estis farata de la meblisto = bordet gjordes av snickaren: pasiva transa verbo, kiu havas la mebliston kiel aganton.

**La -iĝ-verboj ne ekhavu aganton.** Oni diru ekz. : la ĉambro pleniĝis je homoj, mi surpriziĝis pro lia konfeso ktp., t.e. oni evitu la prepozicion de karakterizan por la aganto.

## 2. Simplaj verbformoj kaj nereкта parolo

La grundformo de la verbo estas la **infinitivo** kun la finaĵo -i: veni, vidi, venki.

La **as-formo** montras ke io okazas nun: **estanta tempo**; li rajdas, ni studas.

La **is-formo** montras ke io jam okazis: **pasinta tempo**; hieraŭ mi banis min, ni legis.

La **os-formo** montras ke io okazos: **venonta tempo**; morgaŭ mi forveturos.

La **u-formo** ĝenerale esprimas ordonon aŭ instigon: **imperativo**; obeu! ni provu! marŝu! La imperativon oni rajtas uzi sen subjekto nur en la dua persono (singularo kaj pluralo; en la ceteraj personoj oni diru: li faru, ni obeu, ili skribu, mi donu ktp.

La **u-formo** ĉiam estu uzata post **por ke**; li instruas, por ke ni lernu. Ĝi ankaŭ esprimas, ke io estu konceptata kiel **duba** kaj **necerta**; mi deziras ke ĉiu homo estu esperantisto – ĉu vi volas ke li estu **malfeliĉa**? Tiu ĉi verbformo respondas la **subjektivon**, por kiu Esperanto ne havas apartan finaĵon.

La **us-formo** ĝenerale esprimas kondiĉon; **kondicionalo**; kion vi farus, se vi estus reĝo? – se mi malsatus, mi manĝus, se mi havus ion por manĝi.

Jen la plej simplaj reguloj pri la uzo de la simplaj verbformoj.

Kaj jen kelkaj konsiloj! **Uzu la os-formon, kiam efektive temas pri venonta tempo.**

En la sveda ni ofte diras jag kommer i morgon, sed Esperante oni diru: mi venos morgaŭ; han köper boken om lördag = li aĉetos la libron sabate; Erik reser om två timmar = Erik foriros post du horoj.

**Se vi povas anstataŭigi la svedan vorton "skall" per "kommer att", uzu la os-formon; se ne, uzu la u-formon.** Ekzemploj: han skall tala om fredag = han kommer att tala om fredag – li parolos vendrede; skall du gå (kommer du att gå) på klubben i kväll? = ĉu vi vizitos la klubon hodiaŭ vespere?; vi skall äta kl 17 = ni manĝos je la dek-sepa. Sed: beslutar de närvarande att vi skall uppskjuta frågan? = ĉu la ĉeestantoj decidas, ke ni prokrastu la demandon?; skall jag hjälpa dig? = ĉu mi helpu vin?; mamma, vad ska jag leka? = panjo, kion mi ludu?; hur mycket ska jag betala? = kiom mi pagu?; du ska inte lova för mycket – ne promesu tro.

La **us-formo** oni uzu en jenaj kazoj:

- a) **kiam vere temas pri kondiĉaj frazoj**: ĉu vi elektus tiun ĉi libron, se vi havus la rajton por elekto; se li perdus sian filon, li fariĝus tre malfeliĉa –

- b) **por fari demandon aŭ aserton pli ĝentila**, iom pli hezita: ĉu vi komplezus helpi min?; mi ĝatus amikiĝi kun vi; mi dezirus viziti vin baldaŭ; ĉu mi nun rajtus gustumi la torton? Kompreneble oni ankaŭ ofte diras "ĉu mi rajtas nun gustumi", "mi deziras viziti vin" ktp., sed la us-formo kvazaŭ agrabligas la interparolon –
- c) **por esprimi ke oni iom dube sin demandas**: oni povus opini, ke li nenion komprenas; tio eble kostus tro; kie ŝi trovus novan okupon?

**En nereкта parolo oni uzu la saman verbformon, kiu estu uzata, se oni rektigas la parolon.** Ekzemploj: han trodde, att vi skulle resa bort = han trodde: vi ska resa bort = li opiniis, ke ni foriros; han tänkte, att hon var sjuk = han tänkte: hon är sjuk = li pensis, ke ŝi estas malsana; han trodde, att hon hade hört, att de skulle sjunga imorgon = li opiniis: "ŝi aŭdis, ke ili kantos morgaŭ" = li opiniis, ke ŝi aŭdis, ke ili kantos morgaŭ.

Ekzemploj kun la u-formo: han ville, att barnen skulle gå ut = li deziris, ke la infanoj eliru (li nome diris: "la infanoj eliru"); pappa ville, att man skulle säga till dem, att de skulle hämta läkaren = paĉjo deziris, ke oni diru al ili, ke ili venigu la kuraciston (la patro nome diris: "diru al ili, ke ili venigu la kuraciston"). En ĉi tiuj lastaj ekzemploj oni atentu la u-formon, ĉar oni ne povas esprimi la estontan tempon en la sveda teksto per "kommer att".

Memoru, ke ĉiu ke-frazo eble povus kaŝi specon de nereкта parolo.

### 3. Kunmetitaj verbformoj

**Kunmetitan verbformon Esperantan oni faras per helpverbo kaj participo.** Kiel helpverbon oni neniam uzu alian verbon ol **esti**. Per ordinara simpla finaĵo la helpverbo sola montras "tempus", t.e. ĉu la ago, pri liu oni parolas, okazas nun, en pasinta tempo aŭ estonte. Se tiu ago okazas **nun**, skribu la helpverbon "esti" kun la finaĵo **-as**; se tiu ago okazis en **pasinta tempo**, skribu la helpverbon kun la finaĵo **-is**; se tiu ago okazos en **estonta tempo**, skribu la helpverbon kun la finaĵo **-os**.

**Ni memoru ke nur la helpverbo montru en kiu tempo okazas la priparolata ago.**

Por kunmetitaj verbformoj oni ankaŭ uzu **participon**. Kio estas Esperanta participo? Ĝi estas vorto, kiu konsistas el **radiko**, **ŝanĝebla vokalo** (-a- -i- -o-), **karakteriza participa finaĵo** (-nt- en aktiva kaj -t- en pasiva formo) kaj fine **ordinara vortklasa finaĵo** (-o, se la participo estu substantivo, – -a, se la participo estu adjektivo – -e, se la participo estu adverbo).

**Por kunmetitaj verbformoj oni ĉiam uzu la participon kun la finaĵo -a.** Tiu -a montras ke la participo estas **adjektivo**. Kiel ĉiu alia adjektivo ĝi estas **fleksiebla** kaj ricevas la literon -j por la pluralo, sed **en kunmetita verbformo ĝi neniam havu la n-finaĵon**, ĉar efektive ĝi estas komplemento de la verbo kaj tia komplemento neniam havu akuzativon.

Adjektivo povas esprimi nur kvaliton aŭ staton (neniam "tempus"), kaj tiuj ĉi participoj efektive montras nur **la staton de la ago** en certa priparolata momento. **Se la ago komenciĝis kaj ankoraŭ ne finiĝis en la priparolata momento**, skribu la participon kun -a- inter la radiko kaj la participa finaĵo; **se la ago jam finiĝis en la priparolata momento**, skribu la participon kun -i- ; **se la ago ankoraŭ ne komenciĝis en la priparolata momento**, skribu la participon kun -o- .

Ekz.: nun mi estas skribanta = nu häller jag på att skriva (mi skribas la participon kun -a- ĉar la skribado komenciĝis kaj ankoraŭ ne finiĝis en la priparolata momento "nun"); hieraŭ mi estis skribanta = i går höll jag på att skriva (mi skribas la participon kun -a ĉar la skribado komenciĝis kaj ankoraŭ ne finiĝis en la priparolata momento "hieraŭ"); morgaŭ mi estos skribanta = i morgon kommer jag att hålla på att skriva (mi skribas la participon kun -a- ĉar la skribado komenciĝis kaj ankoraŭ ne finiĝis en la priparolata momento "morgaŭ").

Ni do klara rimarkas, ke la stato de la skribado restas la sama (komenciĝis kaj ankoraŭ ne finiĝis = pĝående), kaj tial la participo ankaŭ restas la sama, havas nome la literon -a-. Por aliaj statoj de la ago aperas resp. la literoj -i- kaj -o- .

Jen ekzemploj:

nun

mi sidas ĉe tablo kun papero kaj plumo, kaj mi prenas la plumon, ĉar mi estas skribonta leteron, kaj letero estas skribota; la plumo laboras, ĉar mi estas skribanta leteron, kaj letero estas skribata; mi remetas la plumon, ĉar mi estas skribinta leteron, kaj letero estas skribita -

hieraŭ

mi sidis ĉe tablo kun papero kaj plumo, kaj mi prenis la plumon, ĉar mi estis skribonta leteron, kaj letero estis skribota; la plumo laboris, ĉar mi estis skribanta leteron, kaj letero estis skribata; mi remetis la plumon, ĉar mi estis skribinta leteron, kaj letero estis skribita -

morgaŭ

mi sidos ĉe tablo kun papero kaj plumo, kaj mi prenos la plumon, ĉar mi estos skribonta leteron, kaj letero estos skribota; la plumo laboros, ĉar



mi estos skribanta leteron, kaj letero estos skribota; mi remetos la plumon, ĉar mi estos skribinta leteron, kaj letero estos skribita.

**Ĉiam preferu simplan verbformon**, se vi ne nepre deziras substreki precizan rilaton inter pluraj agoj, ekz.: kiam mi trovis lin, li estis mortanta; antaŭ ol vi atingos la urbon, la fajro estos estingita; kiam mi eniris la ĉambron, la kuracisto ĝuste estis elironta ktp.

**Nur tre malofte oni uzas kunmetitajn verbformojn kun la u- kaj us- formoj de la helpverbo.** Plej ofte la resp. simplaj verbformoj sufiĉas, kaj tiakaze ĉiam preferu tiajn, ĉar la kunmetitaj formoj nur pezigas la lingvon kaj malfaciligas la interparolon, se oni trouzas ilin.

#### 4. Mallongigo de relativaj frazoj per participo

Relativan frazon oni rajtas mallongigi per participo nur, se ĝi havas la subjekton kiu, ki, aŭ la objekton kiun, kion. **Por tia mallongigo oni ĉiam uzu a-finaĵan participon kun samaj nombro kaj kazo**, kiel havas la vorto aludata de la participo.

1) **Aktiva participo** mallongigu aktivan frazon kun la subjekto kiu, ki:

a) boken, som ligger där, är gul = la libro, kiu kuŝas tie, estas flava = la libro kuŝanta tie estas flava; rosor, som doftar, är härliga = rozoj odorantaj (kiuj odoras) estas ĉarmaj; allt, som blommar, har liv = ĉio floranta (kio floras) havas vivon – en tiuj ekzemploj estas la participo **sen akuzativa -n**, ĉar ĝi aludas **subjekton**, sed:

b) har du köpt allt, som växer här = ĉu vi aĉetis ĉion, kio kreskas tie ĉi = ĉu vi aĉetis ĉion kreskanta tie ĉi?; känner du flickorna, som hälsade = ĉu vi konas la knabinojn salutantajn (kiuj salutis)?; de fångade en man, som stulit = ili kaptis viron ŝtelinta (kiu ŝtelis) – en tiuj ekzemploj estas la participo **kun akuzativa -n**, ĉar ĝi aludas **objekton**.

2) **Pasiva participo** mallongigu aktivan frazon kun la objekto kiun, kion:

a) böckerna, som man läste, är roliga = la libroj, kiujn oni legis, estas amuzaj = la libroj legataj estas amuzaj; texten, som hon ska översätta, är fransk = la teksto tradukota de ŝi (kiun ŝi tradukos) estas franca; allt, som man hade valt, var vackert = ĉio elektita (kion oni elektis) estis bela – en tiuj ekzemploj estas la participo **sen akuzativa -n**, ĉar ĝi aludas **subjekton**, sed:

b) jag åt allt, som man satte fram = mi manĝis ĉion, kion oni alportis = mi manĝis ĉion alportatan; han betalade den summa, som man bestämt = li pagis la sumon deciditan (kiun oni decidis); smek hundarna, som du ska dressera =

karesu la hundojn dresotajn de vi (kiujn vi dresos) – en tiuj ekzemploj estas la participo **kun akuzativa -n**, ĉar ĝi aludas **objekton**.

3) **Pasivan frazon ĉiam mallongigu pasiva participo:**

- a) boken, som stulits, var hans = la libro, kiu estis ŝtelita, estis lia = la libro ŝtelita estis lia; blommorna, som glömts, är ännu friska = la floroj forgesitaj (kiuj estis forgesitaj) ankoraŭ estas freŝaj; allt, som sades, var sant = ĉio dirita (kio estis dirita) estis vera – en tiuj ekzemploj estas la participo **sen akuzativa -n**, ĉar ĝi aludas **subjekton**, sed:
- b) han fick pennan, som hittats = li ricevis la plumon, kiu estis trovita = li ricevis la plumon trovitan; pojken begrep allt, som sades = la knabo komprenis ĉion diritan (kio estis dirita) – en tiuj ekzemploj estas la participo **kun akuzativa -n**, ĉar ĝi aludas **objekton**.

5. Mallongigo de ceteraj frazoj dependaj

Dependan frazon komenciĝantan per subordiga konjunkcio oni rajtas mallongigi per participo, aktivan frazon per aktiva, pasivan per pasiva participo.

**Por mallongigo de frazo, kiu aludas la subjekton de la ĉefa frazo, oni ĉiam uzu e-finaĵan participon.** Ankaŭ en la sveda lingvo eblas participo, sed ne ĉiam la konjunkcio estas forigebla. Ekzemploj: sedan jag slagit honom, sprang jag undan = efter att hava slagit honom, sprang jag undan = batinte lin mi forkuris; slagen (efter att hava blivit slagen, då jag blivit slagen) skrek jag = batite mi kriis; medan vi sjöng (sjungande) var vi glada = kantante ni ĝojis; sedan den blivit sjungen (efter att ha sjungits, sjungen) varje kväll, blev visan populär = kantite ĉiun vesperon, la kanzono fariĝis populara; legonte la libron, li rigardis ĝiajn ilustraĵojn = innan han läste boken, tittade han på dess bilder; ekzekutote, li eldiris sian lastan deziron = innan han avrättades, yttrade han sin sista önskan – en ĉiuj-ĉi ekzemploj e-finaĵo, ĉar la participo aludas subjekton.

**Se la anstataŭanta participo aludas la objekton de la ĉefa frazo, ĝi neniam havu la akuzativan finaĵon.** Jen en la sveda lingvo eblas krom dependa frazo ankaŭ infinitivo aŭ participo. La Esperanta participo havu la finaĵon -j, se ĝi aludas pluralon, sed, **estante predikativo, ĝi neniam havu la akuzativan finaĵon.** Ekzemploj:

jag såg honom, då han dödade tigern = jag såg honom döda tigern = jag såg honom dödande tigern = mi vidis lin mortiganta la tigron; jag såg dem, då de blevo dödade av tigern = jag såg dem dödas av tigern = mi vidis ilin mortigataj de la tigo; jag fann honom ätande (då han åt) = mi trovis lin manĝanta; jag fann köttet till hälften uppätet = mi trovis la viandon duone manĝita – en ĉiuj-ĉi ekzemploj a-finaĵo, ĉar la participo aludas rektan objekton.

La mallongigo per participo mirinde faciligas kaj fluigas la interparolon, kaj mi varme rekomendas al ĉiu zorgan diligentan studon kaj praktikon de tiu frazfarado.

Signe Boye

## V. DAŬRIGA KURSO

(Protokolintoj: Bertil Svensson, Walter Söderqvist)

### 1. Marde, la kvinan de julio

Ni sciiĝis, ke oni povas gvidi Esperanto-kurson laŭ rektaj aŭ nerektaj metodoj. **Rekta metodo** estas ekz. tiu de Ĉe (Cseh). En tia kurso oni esence uzas nur Esperanton, kaj la lecionoj estas konversacio inter instruanto kaj lernantoj. Novan vorton oni enkondukas tiel, ke oni montras objekton, diras ĝian nomon kaj igas la lernantojn, unuope aŭ ĥore, ripeti ĝin. Verbon oni instruas, montrante la koncernan agon: la instruisto staras, nun li iras, la lernanto sidas ktp. Per gestoj oni klarigas la prepoziciojn, ekz. metante objekton sur la tablon, sub la tablon, apud libron ktp. Kiam la lernanto jam havas sufiĉe grandan vort-provizon, li trovas la signifon de novaj (ankaŭ abstraktaj) vortoj el la kunteksto. Estas eraro diferencigi la Ĉe-metodon de la gramatikaj metodoj, ĉar en ĉiu kurso oni devas trakti gramatikon. En la Ĉe-kurso la gramatiko estas eĉ ĉefa materialo de la konversacio. Por instigi la mem-pensadon, la instruisto ofte intence faras eraron, malbonan frazon, por ke la lernanto havu okazon korekti ĝin kaj pro tio esti aparte laŭdata de la instruisto. La kursanoj neniam enuu, kaj tial gravas gajigi ilin per ŝercoj kaj ŝercaj rakontoj. Ĝuste la Ĉe-kurso abundas je tiaj.

En **nerekta metodo** oni uzas por la instruado la nacian lingvon kaj ekzercas la penskapablon per tradukoj el Esperanto kaj en Esperanton. Oni ne tro multe traktu gramatikaĵojn, por ke restu tempo ankaŭ por leg-, parol-, kaj skrib-ekzercoj. La instruisto nepre gardu sin antaŭ eraroj en gramatiko kaj prononco, ĉar la lernanto facile imitas ilin kaj poste malfacile kutimiĝas al la korektaj formoj. Erarojn, speciale en la elparolo, la instruisto ĉiam denove devas korekti, kaj ĉiam li devas unue laŭtlegi la lernolibran tekston, antaŭ ol la lernanto legas ĝin. Estas celkonforme uzi krom la lernolibro apartan lego-libron, ekz. tiun de Setälä, kiu havas interesajn rakontetojn parkere lernendajn.

Instruante gramatikan regulon, oni procedas jaŭ la skemo: ekzemploj – observo – regulo – apliko. Se oni ekz. volas trakti la **substantivon**, oni unue montras objektojn, diras la koncernajn nomojn kaj skribas ilin en apartan kajeron; tiamaniere la vorto estas konceptata per la oreloj (oni aŭdas), okuloj (oni vidas la skribitan vorton), mano (oni mem skribas) kaj buŝo (oni parolas), kaj la signifo de la vorto klariĝas per la montrita objekto aŭ naci-lingva traduko. Observante la donitajn vortojn, ekz. gazeto, kesto, kajero, libro, letero, la lernanto konstatas, ke ĉiuj finiĝas per o. Poste la instruisto deklaras, ke en Esperanto ĉiuj nomoj por objektoj havas tiun finaĵon, t.e. li kondukas la lernanton de la observo al la regulo. Fine necesas apliki la trovitan regulon je novaj vortoj, kaj oni tiam igu la lernanton mem fari Esperantajn vortojn, demandante ekz.: vad heter hund på Esperanto?; oni do demandas pri vorto, kiu nur per la finaĵo diferencas de la naci-lingva vorto. La skemon **ekzemploj – observo – regulo – apliko** oni laŭeble kompletigu per la punkto **ripeto**, per kiu oni resumas aferojn de la antaŭa leciono.

La metodon, instrui gramatikan regulon, s-ro B. ilustris je 2 pliaj ekzemploj: la difina artikolo kaj la pluralo. En ambaŭ okazoj montras la komparo kun la sveda lingvo, kiom simpla estas Esperanto. Gravus elekti **tipajn ekzemplojn**, t.e. ĉiu vorto devas enteni apartan regulon de la nacia lingvo. Jen por la pluralo:

gazeto- <u>j</u> =	tidning- <u>ar</u>	}	<u>unu</u> finaĵo en Esperanto anstataŭas komplikan regularon en la sveda lingvo!
kesto- <u>j</u> =	låd(a)- <u>or</u>		
kajero- <u>j</u> =	häfte- <u>n</u>		
libro- <u>j</u> =	böck- <u>er</u>		
letero- <u>j</u> =	brev - <u>__</u>		

Necesas ankaŭ kombini plurajn regulojn en gramatikaj serioj, t.n. **paradigmoj**, ekz.

domo	granda domo	domo estas granda
la domo	la granda domo	la domo estas granda
domoj	grandaj domoj	domoj estas grandaj
la domoj	la grandaj domoj	la domoj estas grandaj

Jen oni sisteme ekzercas per tradukoj en la svedan aŭ el la sveda la artikolon, la pluralon, la atributan kaj predikativan adjektivojn.

Ĉiu leciono devas enhavi ankaŭ konversacion. Jam en la unua leciono oni povas formi simplan **frazon**, ekz. “la gazeto estas objekto” kaj simplan **demandon**: kio estas la gazeto?, kaj demandojn samspecajn la lernantoj mem povas fabriki. Per tio kreskas ilia memfido kaj sekve la intereso por plua studado. Ĉe la demandvortoj oni ne forgesu emfazi la analogiecon al la responda vorto, ekz.

ki <u>a</u> ?	bon <u>a</u>	kia <u>n</u> ?	bon <u>an</u>
ki <u>aj</u> ?	bon <u>aj</u>	ki <u>ajn</u> ?	bon <u>ajn</u>

Por **daŭriga kurso** validas la samaj metodaj vidpunktoj kiel por elementa. Legante Esperantan literaturon en daŭriga studrondo, oni legu laŭte kaj zorgeme. Rekomendindaj estas Al Torento de Stellan Engholm, Verda Koro de Julio Baghy kaj el la verkaro de Zamenhof la kongresparoladoj. Oni evitu la studon de malnovaj tradukoj Zamenhofaj, ĉar tie, ekz. en "Batalo de l' vivo", aperas tro ofte la sufikso –ad. Post **laŭtleĝo** de kelkaj frazoj oni **analizu la enhavon** per demandoj kaj respondoj (ki-vortoj kaj ĉu?), kaj oni ankaŭ analizu la tekston laŭ **gramatikaj apartaĵoj**; speciale interesajn aferojn de gramatiko kaj stilo la lernanto notu en apartan kajeron. Koncerne **tradukadon** oni ne forgesu la returnan tradukadon ĉe fermita libro, ĉar tiel la kursano devas nepre paroli (ne simple legi) Esperante. Por altigi la parol-kapablon, oni donu temojn por **liberaj paroladoj** aŭ mallongajn tekstojn por parker-lernado. Ĉe la preparo de tiaj paroladoj la lernanto klopodu, ne tro ofte uzi la vortaron; sur paperon li notu t.n. helpvortojn. La plej progresintaj kursanoj provu **originale verki** artikolon aŭ poemon pri libere elektita temo.

Valorega por daŭriga kurso estas la libro **Ellernu** de d-ro Szilágyi. La gramatikaj ekzercoj en tiu libro distingiĝas per tre varia problem-starigo. En ĉiu leciono estas alia metodo por ekzerci gramatikaĵojn: jen la lernanto devas trovi malveraĵojn aŭ lingvajn erarojn, jen enmeti en tekston la akuzativan finaĵon, jen kompletigi per prepozicioj, jen per sufiksoj, jen konstrui demandojn al respondoj ktp. En du lecionoj mankas gramatika parto, sed nur ŝajne: la anstataŭaj kruc-vort-enigmoj donas okazon al la lernanto ripeti plej diversajn gramatikaĵojn, kaj tion en vere amuza formo. Domaĝe nur, ke la libro enhavas ankaŭ la solvojn de la problemoj; jen la lernanto estas tentata malpli mediti kaj tro frue rigardi la solvojn. Estas celkonforme, ĉe nova eldono aperigi la solvojn en aparta libreto, kiun la lernanto aĉetu nur post finita kurso.

## 2. Merkrede, la sesan de julio

S-ro B. daŭrigis la trakton de la libro "Ellernu". Dum aliaj libroj por daŭriga kurso estas ĉefe nur gramatikaj aŭ nur literaturaj, la libro de Szilágyi donas iom de ĉiuj specoj. La leciono nome enhavas gramatikan, konversacian kaj literaturan partojn, krome grup-ludojn. En la konversacia parto gravas la bildoj, kies komiko amuzas ĉujn kaj tiel altigas la intereson. Estas rekomendinde montri la bildojn per lumbild-aparato, ĉar tiel la lernanto fariĝas sendependa de la konversacia teksto en la libro; kompreneble la instruisto rajtas kompletigi tiun tekston per pliaj demandoj, kaj la lernanto respondu tute libere laŭ sia individueco. Ankaŭ la literatura parto estas tre varia: ĝi enhavas poemojn, maksimumojn, fabelojn, novelojn kaj informojn pri la historio

de la mond-lingvo. (Bona kolekto da maksimumoj estas la Proverbaro Esperanta de d-ro Zamenhof.)

La preleganto transiris al preparado de aliaj lernolibroj, tiuj de Massiak kaj Seppik – Dahlgren por elementa kurso, de Seppik kaj Jansson por daŭriga kurso.

La lernolibro de **Massiak** estas destinita por ABF-studrondoj. Laŭ sia strukturo ĝi similas al la angla lernolibro de la sama aŭtoro. Ĉiu leciono konsistas el gramatiko, leg-ekzerco kaj demandoj, kiujn la lernanto skribe respondu por ĉiu venonta leciono. En 4 lecionoj anstataŭas la demandojn ekzercoj pri traduko el la sveda en Esperanton, kaj fine oni postulas de la lernanto, ke li verku artikoleon. La participoj estas traktataj nur per ekzemploj, mankas aparta leciono pri ili. Aldono al la libro estas “Kommentarer” kun klarigoj svedlingvaj; en tiu broŝuro estas por ĉiu regulo unu tipa ekzemplo, pliajn ekzemplojn donu la instruisto. Specialaĵo de la Massiak-a lernolibro estas, ke ĝi donas bonajn konsilojn pri la traduko de certaj svedaj vortoj, ekz. det, för, som, få, skulle. La metodo konsistas en tio, ke oni devas doni la sencon per anstataŭa vorto, ekz. se oni povas anstataŭigi som per vilken (vilket), oni diras kiu, sed som en la signifo såsom estas tradukata per kiel.

**Systematisk kurs** estiĝis el la kunlaboro de la estona Ĉe-instruisto Seppik kaj la sveda instruisto Malmgren. Diference de la Massiak-a lernolibro troviĝas svedlingvaj klarigoj ne en aparta kajero, sed enestas la libron. Krome ĉiu nova vorto estas subnote tradukita, oni do ne bezonas foliumi en vortaro. La libro akcentas la praktikan flankon de Esperanto, ekz. korespondadon kaj turismon. La rakontoj estas parte tre fantaziaj por amuzi la lernanton, ekz. “Erik songas” kun priskribo de vojaĝo en la diversaj kontinentoj. Inter ĉiuj lernolibroj “Systematisk kurs” estas plej malmultekosta.

**Högre kurs i Esperanto** de lektoro H. Seppik estas detala libro gramatika kun klarigoj en sveda lingvo kaj ampleksa taskaro. La gramatikajn malfacilaĵojn klarigas Seppik en surprize simpla, sprita kaj vere pedagogia maniero. Same altvalora estas **Praktisk lärobok** de Sam Owen Jansson. Ĉi-libro enhavas centojn da paragrafoj, por ke la lernanto paŝon post paŝo proprigu al si la delikataĵojn de nia lingvo. Speciale rekomendindaj estas la traduk-ekzercoj de “Praktisk lärobok”, precipe por tiu, kiu volas prepari sin por ekzameno. La libroj de Seppik kaj Jansson estas la plej bonaj kaj fidindaj svedlingvaĵoj por profunda studo de Esperanto.

### 3. Ĵaŭde, la sepan de julio

Pro speciala deziro de partoprenanto s-ro B. parolis pri la **akuzativo**. Oni povas enkonduki la akuzativon parolante pri la **libera vortordo** en Esperanto (mi estas

instruisto – instruisto estas mi) kaj aplikante ĉi-vortordon je la frazo li amas ŝi; jen ŝi amas li diras la samon, sed oni ne scias, kiu amas, nek kiu estas objekto de la amo. Tiun malklaron forigas la litero n, ĉar ĉiam la objekto de la ago esprimiĝas per n-vorto. Instruante oni donu multajn pliajn ekzemplojn, elektante aliajn verbojn kaj anstataŭigante la pronomojn per substantivoj. Por montri la direkton de la ago, oni desegnu sagon, kaj por distingi subjekton kaj objekton, oni uzu divers-kolorajn kretojn, ekz.

la kato o manĝas la muson ;

la muso manĝas la kato

Entute la koloroj bone taŭgas por koncentrigi la intereson al instruendaj gramatikaĵoj, speciale ankaŭ ĉe la analizo de propozicioj. Komparo kun la sveda lingvo montras, ke ankaŭ ĝi havas apartan formon por la akuzativo, sed nur ce la pronomo; oni ja ne diras han älskar hon. Estante reguleca lingvo, Esperanto devas havi la akuzativan finaĵon ĉiam ĉe **rekta komplemento**, do ankaŭ, se ĉi-komplemento ne estas pronomo, sed substantivo. La instruisto ne forgesu, ĉiam emfazi la akordiĝon inter demando kaj respondo, ekz.

kiu amas? li.

kiu amas li? ŝi.

La akuzativon oni aplikas ankaŭ por signi **tempon** kaj **mezuron**, responde al la demandoj kiam? kaj kiom? La demand-vorto kiom povas esti sola (kiom kostas la kostumo?) aŭ ligiĝi kun adjektivo (kiom longa, larĝa, alta, dika, granda, peza, aĝa) aŭ substantivo (kiom da tagoj, kiom da kronoj). Oni ne almetu la literon n, se la koncerna kvanto aperas en la subjekto, ekz.

kiom da tagoj formas monaton?                      30 tagoj formas monaton –  
sed: kiom da tagoj li restas?                              li restas 5 tagojn.

En la frazo li estas 30 jarojn aĝa ne estas la vorto estas, kiu postulas la akuzativon, sed la kun ĝi ligita adjektivo aĝa, kaj same statas la afero ĉe la aliaj nomitaj adjektivoj (granda, peza ktp.). Oni rajtas ankaŭ diri li havas la aĝon de 30 jaroj ( - la grandon de 170 centimetroj, pezon de 70 kilogramoj) aŭ li aĝas 30 jarojn. Krome oni rajtas anstataŭigi la akuzativon per prepozicio (Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 = Z. naskiĝis je la 15-a de decembro 1859) aŭ adverbo (pasintan jaron = pasintjare), precipe, se oni volas eviti tro da n-finaĵoj en unu frazo; ekz.

li renkontos sian amikon venont-dimanĉe je la 12-a  
estas stile pli bona ol

li renkontos sian amikon venontan dimanĉon la 12-an horon.

Specialan atenton meritas la akuzativo de la **direkto**. Por enkonduko taŭgas la frazoj

li iras en la ĉambro – li iras en la ĉambron

kun la respektivaj demand-vortoj kie kaj kien. Poste oni donu frazojn kun du diversspecaj akuzativoj (rekta komplemento + direkto-akuzativo), ekz.

li metas la libron sur la tablon

kaj vidigu la lernanton, ke la rekta komplemento (la libro) kontraŭe al la cirkonstanca komplemento (sur la tablon) ne estas provizita per prepozicio. En la frazo

la libro kuŝas sur la tablo

aperas la sama prepozicio sur, sed nun kun nominativo, ĉar oni demandas per kie, ne kien. En kaj sur estas **dukazaj prepozicioj**: loke ili postulas la nominativon, direkte la akuzativon. Oni kompletigu per ekzemploj kun aliaj prepozicioj kaj fine donu la tabelon de la dukazaj prepozicioj:

antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, ekster, en, inter, kontraŭ, post, preter, sub, super, sur, tra, trans.

**Ĉiuj aliaj prepozicioj** estas unukazaj, eĉ se kelkaj esprimas direkton (al, ĝi) kaj kvankam ĉiuj svedlingve sekvigas honom kaj henne anstataŭ han kaj hon. Estas do eraro diri kun lin, pri la kamaradon, skribi al lin, sed oni rajtas diri skribi lin, ĉar tiam la akuzativo anstataŭas prepozicion. Tamen oni evitu tian uzon de la akuzativo, se ankoraŭ sekvas rekta komplemento: skribi lin leteron ne sonas bone.

#### 4. Vendrede, la okan de julio

S-ro B. traktis la **korelativan tabelon**. Ĝi ne estas tute artefarita, ĉar la komenc-sonoj ki-, ti-, i-, neni- memorigas pri certaj vortoj en naturaj lingvoj. La tabelo konsistas el pronoma parto (-u, -o, -a, -es) kaj adverba parto (-o, -el, -al, -am, -om). La vortoj kun -o kaj -e povas ricevi la finaĵon -n, tiuj kun -u kaj -a la finaĵojn -n, -j, kaj -jn. Aliaj vortoj de la tabelo povas akiri ĉi-finaĵojn nur post substantivigo aŭ adjektivigo, ekz. el kial oni povas derivi kialo, kialon, kialojn., el tiam la vortojn tiam, tiaman, tiamaj, timajn. Nerekomendindaj estas kiele, tiel k.a., ĉar kiel, tiel jam estas adverboj, do ne bezonas adverbajn finaĵojn. La fin-sonoj -u, -o, -a, -e ne estas gramatikaj finaĵoj; tamen en la praktiko la -o kaj -a-vortoj ludas la rolon de repektivaj substantivoj kaj adjektivoj. En analogio al tabelvortoj multaj esp-istoj uzas la formojn aliu, alies, alie, aliel, alia, aliam, sed prefere oni diru resp. iu alia, de alia, aliloke, alie (= alimaniere), alikaŭze, alitempe. La influo de idistoj montriĝas en la uzo de pro kio, pro tio anstataŭ kial, tial; oni ankŭ diras kiamaniere, tiamaniere ktp. anstataŭ simple kiel, tiel (tute malbona: kielmaniere). Kompletigaj vortetoj estas ĉi kaj ajn; modernaj aŭtoroj ofte uzas ĉi kiel prefikson (ĉi-domo = tiu ĉi domo aŭ neglektas la diferencon inter tiu kaj tiu ĉi).



Ĉar la preparo de la vespera programo okupis preskaŭ la tutan lecionon, okazis aparta leciono por interesitoj dum la posttagmezo. Temis pri transformo de aktiva frazo en pasivan; ekz.

ĉevalo tiras veturilon      fariĝas      veturilo estas tirata de ĉevalo

Analizante ambaŭ frazojn, oni trovas, ke la subjekto de la aktiva frazo (ĉevalo) estas t.n. **aganto** en la pasiva frazo kaj tie akompanata de la prepozicio de. La verbo kompreneble transiras al la pasiva formo, en nia ekzemplo sub la kostumo estas –ata. La rekta komplemento fine (veturilon) igas subjekto en la pasiva frazo, kaj **ĉar subjekto neniam montriĝas akuzativo**, malaperas la finaĵo –n. Jen tre grava fakto por la instruisto, ĉar li nun devas pliprecizigi al la lernanto la aserton, ke la objekto de la ago esprimiĝas akuzativo. Tiu aserto, kiun oni starigas ĉe la enkonduko de la akuzativo, estas ĝusta nur por la aktiva frazo. Male en la pasiva ĝuste la objekto de la ago konformas al vorto liberigita de la n-finaĵo.

Multaj eraras pri la akuzativo, ĉar ili ne sufiĉe konscias pri la karaktero de la frazeroj. Ĉar en normala vortordo ofte akuzativo troviĝas fine de frazo, ili emas doni la finaĵon –n senpripense al la lasta vorto. Ili skribas ekz.

sur la tablo kuŝas librojn

kaj opinias, ke ja la libroj estas objekto de la ago (nome kuŝado). Necesas atentigi ilin, ke sur la tablo ne povas esti subjekto, ĉar ĝi respondas la demandon kie; ĝi do estas cirkonstanca komplemento loka (rumsadverbial). Ĉar ordinare ĉiu frazo devas havi subjekton (kelkfoje ci-lasta estas subkomprenita), oni konkludas, ke libroj estas subjekto; tial la n-finaĵo estas malpermesita, kaj la demando-vorto por tia frazparto devas esti kio (aŭ kiu, kiuj). Jen la sveda lingvo estas tre malklara, ĉar ĝi havas nur unu vorton por kio kaj kion, nome vad, kaj ankaŭ ĉe la aliaj demand-vortoj mankas aparta formo akuzativa. La verbo kuŝas estas netransitiva, kio signifas, ke ne ekzistas **celaĵo de la ago** (pli bona esprimo ol “objekto de la ago”). Svedlingve mi ne povas demandi vad ligga böcker? Kaj tio evidentiĝas la netransitivan karakteron de ligga. Sed same, kiel mi de la netransitiva ligga transiras al la transitiva lägga – oni povas demandi vad lägger jag? – same mi en Esperanto transiras de kuŝi al kuŝigi, kaj nun la afero ŝanĝiĝas:

mi                      kuŝigas                      librojn                      sur la tablon  
*subjekto                      predikato      rekta komplemento      komplemento de la direkto*

Grava regulo estas ke **netransitiva verbo neniam povas havi pasivan partupon**. Oni do neniam diru kuŝata, brulita, edziĝita; korektaj formoj estas aŭ kuŝanta, brulinta, edziĝinta aŭ kuŝigata, bruligita, edzigita.

## 5. Lunde, la dek-unuan de julio

En la Esperanta vortfarado oni distingas 4 specojn de vortpartoj, nome **radikojn, finaĵojn, prefiksojn kaj sufiksojn**. La vorto malsekigas ekz. konsistas el la prefikso mal-, radiko sek-, sufikso -g kaj finaĵo -as. Laŭ la aglutina karaktero de Esperanto ĉiuj vortelementoj estas radikoj, do ankaŭ prefiksoj, sufiksoj kaj finaĵoj. La radikojn oni dividas en 2 grupojn, nome finaĵo-bezonajn kaj memstarajn. Ĉi-lastaj, ekz. la tabel-vortoj, fundamentaj numeraloj kaj prepozicioj, ne havas finaĵojn, sed povas liveri pliajn vortojn helpe de finaĵoj, dume la finaĵo-bezonaj vortoj apenaŭ povas ekzisti sen finaĵoj; nur en la poezio oni rajtas apostrofi la finaĵon -o.

Prefiksojn kaj sufiksojn oni nomas per komuna vorto **afiksoj**. S-ro B. donis klasifikon de la afiksoj laŭ 4 ĉef-grupoj: afiksoj por **personoj** (ekz. -in, ge-, -ul), por **objektoj** (ekz. -aĵ, -il, -uj), por **kvalitoj** (ekz. mal-, -ec, -ebl) kaj por **agoj** (ekz. -ig, -iĝ). En lernolibroj estas ofte malbona aranĝo de la materialo lernenda, ĉar en kelkaj lecionoj mankas, en aliaj troas novaj afiksoj. Por progresigi la lernanton en natura maniero, oni donu en ĉiu leciono 2 novajn afiksojn (nek pli nek malpli), laŭeble 2 inter si parencajn. Afiks-paroj estas ekz. -in + ge (sekso), -eg + -et (grado), -ar + -er (kvanto [ŝerco: er-ar-o]), -ec + -ism (abstraktaĵo), ek- + -ad (daŭro), -aĉ + fi- (malbonaĵo). Kompreneble oni devas klarigi ĉiun afikson per multaj ekzemploj kaj montri, kiel oni per la derivado ŝparas por la memoro: derivante ekz. la vortojn fratino, ŝlosilo, malsana, de resp. frato, ŝlosi, sana, ni ne bezonas lerni tute novajn vortojn por la svedaj syster, nyckel, sjuk.

La **plej malfacilaj sufiksoj** estas -ig kaj -iĝ, la “perloj” de la Esperanta gramatiko; ilia ĝusta uzo premisas la scion pri transitivaj kaj netransitivaj verboj. (Bedaŭrinde pro tempo-manko ne povis okazi aparta leciono pri tiu grava problemoj!)

La sufikso -uj havas la signifojn: 1) entenilo, 2) arbo, 3) lando. Por forigi tiun plursencecon, multaj esp-istoj uzas la sufikson nur en la unua signifo. Laŭ ili oni diru pom-arbo anstataŭ pomujo, ĉar pomujo nepre estas ujo (ekz. kesto aŭ korbo) por pomoj. Por landnomoj Hodler enkondukis la sufikson -io, dirante ekz. Germanio anstataŭ Germanujo, kaj krome ekzistas kunmetaĵoj kun -lando, ekz. Germanlando, Svedlando ktp. Profesoro Christaller proponis apostrofi la vokalon -u, por ke oni havu laŭeble naturan elparolon: Germánjo, sed la propono ne efektiviĝis.

Se sufikso aŭ radiko havas plurajn signifojn, oni nomas ĝin **homonimo**. Homonimo en la sveda lingvo estas ekz. la vorto glas, kiu signifas aŭ certan substanco aŭ trinkujon konsistantan el tiu substanco, Esperanto kiel logika lingvo provas laŭeble efektiviĝi la principon “ĉiu vorto havu nur unu signifon”, kaj pro tio havas por glas laŭ la signifo diversajn tradukojn, nome vitro kaj glaso. Alia ekzemplo estas la franca

vorto langue, kiu same kiel la itala lingua signifas kaj vortsistemon kaj la organon por gustumo kaj parolo (svede: språk = tungomål), dum Esperanto bone distingas ambaŭ nociojn per la vortoj lingvo kaj lango. Tamen ankaŭ Esperanto abundas je homonimoj, kio certe pruvas, ke ĝi estas lingvo viva. Tiun econ oni jam povas studi je la vorto lango: logike ĝi devus akordiĝi al nur unu signifo, sed la poeto, kiu volas atingi pli altan impreson por konkretigo, parolas pri glata langvo en la signifo flata lingvo, t.e. li donas al la vortoj glata kaj lango **nepropran signifon**, li uzas **metaforon**.

Ofte pluraj vortoj havas la saman aŭ nur malmulte diferencajn signifojn, kaj tiam oni parolas pri **sinonimoj**. Estas ekz. nenia senco-diferenco inter vinagro kaj aceto, kaj parenca (kvankam ne egala) signifon havas ekz. nejuna kaj maljuna. Sinonimojn en Esperanto oni ricevas, prenante samsignifajn radikojn el diversaj lingvoj – la slav-devena klopodi tre parenca al la latinida peni – aŭ difinante neologismojn per kunmetita vorto: angoro = korpremiteco.

En **Plena Vortaro** oni trovas la homonimojn, t.e. la diversajn signifojn de unu vorto, indikitaj sub diversaj ciferoj de la sama artikolo, la sinonimojn post la signoj vd (vidu) kaj kp (komparu).

En la **derivado** Esperanto estas foriginta multajn sinonimojn de naciaj lingvoj; la francaj vortoj grandeur, gentillesse, rapidité, esclavage konformas al la Esperantaj grandeco, ĝentileco, rapideco, sklaveco, kio montras, ke la nocio eco esprimiĝas per pluraj diversaj sufiksoj en la franca lingvo. La ekzemploj estas cititaj de Edmond Privat, kiu ĉi-kaze emfazas, ke la samaj sufiksoj estas ankaŭ homonimoj en la franca: -eur ekz. havas ankaŭ la signifon -ema kaj -emulo (moqueur), gentillesse estas kaj ĝentileco kaj ĝentilaĵo, kaj en aliaj vortoj -esse signifas -ino (doctoresse). Ekzemploj el la sveda lingvo:

- |                                |                                                  |
|--------------------------------|--------------------------------------------------|
| 1. <u>arbet-sam</u> = laborema | 2. (yrkes-)lär- <u>are</u> = instru- <u>isto</u> |
| <u>lek-full</u> = ludema       | <u>rök-are</u> = fum- <u>anto</u>                |
| <u>uppror-isk</u> = ribelema   | 3. <u>ät-ande</u> (person) = manĝ- <u>anto</u>   |
| <u>medgör-lig</u> = konsentema | <u>ät-ande</u> (spisning) = manĝ- <u>ado</u>     |
| (Obs.: konsent-i = medgiv-a    |                                                  |

## 6. Marde, la dek-duan de julio

La principon pri **sufiĉo kaj neceso** oni povas studi je la ekzemplo: libereco, egaleco, frateco. **Sufiĉas** diri libero, egalo, t.e. oni forlasas la sufikson -ec, sed **necesas** ĉi-sufikson en la vorto frateco, ĉar frato ja estas persono, ne kvalito. (Rimarko: det fria – la libera; något fritt – io libera.) Same estas diferenco inter amikeco kaj amiko, natureco kaj naturu, sed grandeco = grando, blindeco = blindo, inteligenteco =

inteligento ktp. Simile statas la afero ĉe aliaj sufiksoj, ekz. –ad, kiun oni uzas ofte por substantivigo de verboj. –ad estas superflua en lernado, legado, manĝado, sufiĉas diri lerno, lego, manĝo, sed nepre necesa ĝi estas en brosado, kronado, telefonado, ĉar broso, krono, telefono ja ne estas agoj sed objektoj (iloj).

Tamen oni ne eraras dirante libereco, bildeco, legado ktp.; la mallogigo je libero, blindo, lego estas afero de gusto, kaj la plej multaj esperantistoj eĉ uzas la vortojn kun sufikso. Sed ofte oni renkontas en libroj kaj gazetoj formojn kun sufiksoj, kies uzo estas absolute erara. Ekz. gimnaziejo, burĝulo, brosilo anstataŭ resp. gimnazio, burĝo, broso: gimnazio jam entenas la nocion ejo, burĝo la nocion persono, kaj brosilo estus korekta nur, se broso signifus agon, ne instrumenton. Malbona estas –an en svedano, germanano ktp.. sed necesas en holandano, irlandano, islandano.

Modernaj esp-istoj forlasas ankaŭ sufikson, se ĝi troiĝas pro la kunteksto. Kial diri “ŝi estas bona esperantistino”, se la subjekto jam indikas virinon? (Ni ankaŭ ne diras svede: hon är en god kvinnlig esperantist!) Tamen estas limo: neniam la vortojn patrino, filino, fratino ktp. povas anstataŭi patro, filo, frato!

Se vorto havas plurajn sufiksojn, oni ofte povas aŭ devas forĵeti unu el ili. Prof. Christaller rekomendas simpligi –ulino je –ino, do diri belino, blindino ktp.; belino ja estas bela ino, neniom pli. Ĉar la **participo-substantivoj signas personojn**, troas la sufikso –ul kaj devas ekz. esti konato anstataŭ konatulo, kaj en la matematiko oni provas trovi ne la nekonaton, sed la nekonataĵon (necesas –aĵ) samkaŭze estonteco en la signifo framtid estas pli bona ol estonto. La sufikso –ec estas superflua post –abl, –en, –ind, kaj sekve sufiĉas diri lerneblo, legemo, rindindo anstataŭ la pezaj lernebleco, legemeco, rindindeco. Post –ig kaj –iĝ oni povas elimini la sufikson –ad, ekz. diri disvastigo anstataŭ disvastigado.

Ankaŭ prefiksojn oni povas malhavi: altigi bone anstataŭas plialtigi, ĉar igante ion alta, oni kompreneble igas ĝin pli alta ol ĝi estis antaŭe. Vere troa estas ek- en ekkomenci, ĉar ek- samsencas al komenc- ; tia formo, simile al la plej unua, estas pravigita nur tiam, kiam aŭtoro volas elvoki apartan senton per superlativo.

## 7. Merkrede, la dek-trian de julio

La preleganto montris 2 memfaritajn **vortarojn** kaj rekomendis al ni, ankaŭ fari tiajn. La unua vortaro enhavas radikojn de la Universala Vortaro (inkluzive afiksojn kaj finaĵojn). Ili estas alfabete ordigitaj en 4 kolonoj. En la unua kolono troviĝas ĉiuj radikoj, kies naci-lingva traduko estas substantivo, en la dua ĉiuj kun verba traduko, en la tria ĉiuj kun adjektiva traduko, en la kvara ĉiuj memstaraj radikoj. La

Esperanto-ŝlosilo enkavas iom pli malgrandan nombron, entute proksimume 2000 vortojn, el kiuj laŭ la traduko 900 estas substantivoj, 600 verboj, 200 adjektivoj kaj 300 ali-specaj. La dua vortaro konsistas el la vortoj de la oficialaj aldonoj al la Fundamento, kaj la vortoj estas aranĝitaj tiel, ke tiuj de la unua aldono troviĝas en la unua kolono, tiuj de la dua aldono en la dua kolono ktp. Plej grandas estas la nombro por la unua aldono, kaj por tiu posta la nombro iĝas pli malgranda. Tio montras, ke la Esp-a Akademio ne intencas, oficialigi tro da novaj vortoj; ĝi konsciencie ekzamenas, ĉu nova vorto vere necesas. Starigante tiajn vortlistojn, oni profundiĝas en la strukturon kaj historion de la Esperanta vortaro; studante la naci-lingvajn tradukojn el la Fundamento kaj ŝlosiloj, oni informas sin pri la deveno de la vortoj, la Esperanta etimologio. En Plena Vortaro ni renkontas ankaŭ milojn da neoficialaj vortoj; ili estas markitaj per malgranda komenc-litero, dum la oficialaj vortoj havas grandan, kaj ĉe la vortoj de la Fundamento krome aperas steleto. Entute Plena Vortaro havas proksime 7000 radikojn, el kiuj oni povas derivi sennombrajn milojn da aliaj vortoj.

Por doni ekzemplo pri instruo en elementa kurso, s-ro B. traktis la **infinitivon**. Oni enkonduku ĝin per ekzemploj kun **helpverboj** (povas, volas, devas). Mi povas kantas estus svede jag kan sjunger; jen malĝusta sveda esprimo, kaj same malbona estas la Esperanta. El sjunger devas fariĝi sjunga, el kantas: kanti. Regulo: Post "povas" staras verbo kun finaĵo -i. Apliko: 1) la vorton "mi" anstataŭas aliaj pronomoj aŭ substantivo, vortoj ankaŭ en pluralo; vi povas kanti, li povas kanti, ni povas kanti, la infanoj povas kanti; 2) la lernanto elektu aliajn verbojn; ŝi povas ridi, ili povas manĝi, Andersson povas fumi. Poste oni deklaras, ke la i-formo nomiĝas infinitivo. Komparo kun la sveda lingvo montras, ke ankaŭ povis, povos postulas infinitivon. Nova ekzerco. Fine oni traktas analoge la kombinojn kun volas, volis, volos, kun devas, devis, devos, kaj enkondukas la nocion "helpverbo": povasm volas, devas, povis, volis, ktp. estas helpverboj. Ĝenerala regulo: verbo post helpverbo aperas kiel infinitivo. Laŭ tiu regulo la lernanto formu multajn pliajn ekzemplojn.

Nur nun oni parolu pri la **infinitiva rekonilo**, la sveda vorto att. Oni montras, ke krom post helpverbo la infinitivo staras ankaŭ post att, för att, utan att, i stället för att, kaj en ĉiuj-ĉi kazoj la vorto att ne estas tradukata. Ekzemploj:

la arto paroli fremdan lingvon	(att tala = paroli)
ni manĝas por vivi	(2 infinitivoj: por pov_i vivi_i)
li iris sen diri vorton	(pli elegante: ne dirante vorton)
antaŭ ol veturi, oni aĉetas bileton	(sveda traduko sen infinitivo: innan <u>man åker</u> , köper man biljett)
anstataŭ ol lerni, li promenis	(ol same kiel post antaŭ)

La instruisto de forgesu atentigi pri tio, ke att estas tradukata per ke, se la posta verbo ne estas infinitivo; tiam la dependa frazo ankaŭ havas apartan subjekton:

Zamenhof kreis Esperanton, por ke la homoj divers-naciaj interkompreniĝu  
(sed: ..... por interkomprenigi la homojn).

Estante subjekto, la infinivo postulas **adverban predikativon**:

Resti ĉe leono estas danĝere (ekzemplo de Zamenhof)  
(sed: restado ĉe leono estas danĝera.)

## 8. Vendrede, la dek-kvinan de julio

La lasta leciono temis pri **stilistiko**. Klasika libro pri tiu scienco estas “Esprimo de sentoj en Esperanto” de d-ro **Privat**. Ĝi estas pli facile komprenebla ol “Lingvo, stilo, formo” de Kalocsay.

I.a. Privat emfazas la utilon de la akuzarivo por la **libera vortordo**; jen oni havas la eblon komenci frazon per tiu vorto, kiu por la sento estas plej grava, sendepende de la rigida skemo: subjekto – predikato – objekto. De sama vidpunkto oni devas prijuĝi la pluralajn formojn de la adjektivo (-aj, -ajn), kiuj troas nur por la supraĵa vido.

Iom pki detale ni parolis pri la 5-a ĉapitro: Esprimaj rimedoj. En ĝi “tradukis” Privat la **objektivan konstaton**

*Ŝi eliris el la vendejo je la deka. Mi estis atendinta ŝin ekstere de la naŭa kaj duono. La pluvo tre malsekigis min.*

en la lingvo de la **sento kaj pasio**:

*Fine ŝi aperis el tiu butikado! Horojn mi atendegis sub pluvo kaj estis dronigita ĝis ĉemizo!*

Je tiu ekzemplo oni povas bone ilustrati la diferencon inter la objektiva kaj subjektiva, inter logiko kaj pasio. **Esprimaj rimedoj** de la sento estas: 1) sona plilaŭtigo de iu frazero (ekz. de la vorto deka); 2) ŝanĝo de la vortordo (oni komencu ekz. per je la deka; 3) ripeto de vortoj (ekz. atendis, atendis, atendis); 4) forigo de vortoj (ekz. verbo malaperas en fine si!); 5) elekto inter ekzistantaj vortoj (ekz. superlativo finfine – mensogo horojn mi atendis); 6) kreo aŭ modifo de vortoj (magazeno iĝas butik-ado).

Speciale rimarkindaj estas tiuj reguloj por la **oratoro – propagandisto**, kiu sukcesas per lerte aranĝitaj demandoj kaj respondoj, ripeto kaj plilaŭtigo de ĉefaj vortoj, ŝanĝo de la vortordo. Ekz.: Kiu lingvo havas la plej simplan gramatikon? Kiu lingvo la plej logikan vortfaradon? Kiu lingvo estas vere internacia? Esperanto! ... Esperanto havas nur malmultajn regulojn! Esperanto havas neniom da esceptoj! Esperanto jam nun

funkcias bonege en la praktiko! Grandan literaturon ĝi jam havas post nur 50-jara ekzisto! Fratecon ĝi kreas inter la homoj!

Kompreneble la skriba lingvo, estante pli objektiva kaj senpasia, evitu la trouzon de tiuj rimedoj esprimaj.

## ALDONO

### La sufiksoj -ig kaj -iĝ

Ambaŭ sufiksoj esprimas **ŝanĝon de stato**: *igi* = kaŭzi staton (sek-igi = kaŭzi la staton de seko, fari seka), *iĝi* = veni en staton (sek-iĝi = veni en la staton deseko, iĝi seka). (Kaj sek-i = esti en la stato de seko, esti seka!)

**Ĉiuj ig-verboj** esprimas agon pasantan de subjekto al objekto, estas do **transitivaj**, ekz. la varmo sekigas la teron = igas la teron seka = kaŭzas la staton de seko ĉe la tero; la ago transiras de la subjekto (la varmo) al la objekto (la tero), kiu lasta devas ricevi la akuzativan finaĵon.

**Ĉiuj iĝ-verboj estas netransitivaj**: la tero sekiĝas pro la varmo; rekta komplemento ĉi tie ne eblas.

En la ĝis nun cititaj ekzemploj la analizo okazas plej simple per **adjektivo**: sekiĝi = *igi seka*, sekiĝi = *iĝi seka*. Simile: klarigi = *igi klara*, klariĝi = *igi klara*; heligi = *igi hela*, heliĝi = *iĝi hela* ktp.

En aliaj kazoj oni difinas pere de **substantivo** (*edz-igi* = *igi iun edzo*, *nokt-iĝi* = *iĝi nokto*), **verbo** (*dev-igi* = *igi iun devi*) aŭ **memstara radiko** (*unu-iĝi* = *iĝi unu*).

Ofte -ig kaj -iĝ postulas **prepozician prefikson**: en-man-igi ion = *meti ion en ies mano* = kaŭzi la staton de en-man-eco ĉe io, sen-vual-igi ion = *sen-igi ion je vualo*, sub-akv-iĝi = *veni en la staton de sub-akv-eco*.

**Ĉe analizo pere de verbo oni ĉiam povas subkompreni partecipan finaĵon**, kaj tiam estas 6 ebloj:

- 1) **-ig transitivigas netransitivan verbon**: pasigi = *igi pasanta* (la tempo pasas – mi pasigas la tempon);
- 2) **-ig faras el transitiva verbo alian transitivan verbon**, kaj oni subkomprenas **aktivan partecipon**: sciigi iun = *igi scianta iun* = underrätta någon (ni scias la aferon – ni sciigas lin pri la afero);

- 3) **-ig faras el transitiva verbo alian transitivan verbon**, kaj oni subkomprenas **pasivan particon**: sciigi ion = igi ion sciata = meddela naĝot (mi sciigas la aferon al li);
- 4) **-iĝ faras transitivan verbon netransitiva**, kaj oni subkomprenas **pasivan particon**: detruigi - iĝi detruata (la hajlo detruas la florojn – la floroj detruigas pro la hajlo);
- 5) **-iĝ faras transitivan verbon netransitiva**, kaj oni subkomprenas **aktivan particon**: sciigi = iĝi scianta (li sciigis pri la afero);
- 6) **-iĝ faras el netransitiva verbo alian netransitivan verbon**: pendigi = iĝi pendanta (la ĉapelo pendas – la ĉapelo pendigas).

Sub la influo de naciaj lingvoj **-iĝ akiris ankaŭ refleksivan kaj reciprokan signifojn**, kvankam ĉi tiuj multe diferencas de la origina signifo: interesiĝi = interesi sin (-iĝi = -i sin), sidiĝi = sidigi sin (-iĝi = -igi sin), ellitigi = ellitigi sin, renkontiĝi = renkonti reciproke (-iĝi = -i reciproke).

Se **-iĝ** subkomprenigas pasivan particon, **la diferenco al la ordinara pasivo estas tro subtila**:

la varoj vendigas = la varoj iĝas vendataj, venas en la staton de vendateco; la varoj estas vendataj = la varoj estas en la stato de vendateco.

**En la praktiko oni pleje neglektas tiun diferencon**, kaj tial svedoj ofte tradukas la pasivan finaĵon –s per **-iĝi**: säljas = vendigi. Jen oni devas esti singarda, ĉar ĉe kelkaj vortoj tiu –s ne havas pasivan signifon: skämmas = honti, ne hontiĝi; hontiĝi signifus iĝi hontanta, sed ordinare oni, uzante la vorton hontiĝi, opinias esti hontanta, devas do diri honti.

**Ankaŭ la sufikson -ig oni ofte uzas erare**, ekz. dirante konvinkigi kaj opiniante konvinki: mi konvinkigis lin signifas, ke mi igis lin konvinkanta aŭ konvinkita pere de alia persono, kaj se oni ne opinias tion kaj volas esprimi mem-agadon, oni nepre diru mi konvinkis lin; laŭ alia analizo mi konvinkigis lin = mi igis lin konvinkanta kaj ankaŭ en tiu ĉi signifo ne esprimas la saman kiel mi konvinkis lin.

**Tria eraro estas la kombino -iĝata** (aŭ: iĝ-ita, iĝ-ota), ĉar neniam netransitiva verbo povas havi pasivan particon; sekve oni ne diru edziĝ-ita. Sed estas alia afero, se **la pasiva finaĵo troviĝas antaŭ la sufikso -iĝ** kiel ekz. en la vorto kon-at-iĝi (signifo: iĝi konata).

Ernst Bepperling



## VI. VESPERAJ PRELEGOJ

### 1. Marde, la kvinan de julio

Oni anoncis prelegon de s-ro Bepperling per **afiŝo** kun la verda stelo kaj ankaŭ informis la rektoron de la Vigbyholma lernejo, s-ron Sundberg, kiu siavice komunikis la aferon al la kanthoro.

Vespere je la 9-a kaj 15 f-ino Begström bonvendeziris la ĉeestantojn kaj deklaris, ke la **eksterlandaj samideanoj** unue salutos en sia propra lingvo kaj poste en Esperanto, el kiu lingvo f-ino Dahlgren tradukos sveden. La komencon faris la latva samideano, s-ro Mikelsons, kaj sekvis la rumano, s-ro Morariu, la finnlandano, s-ro Jokinen, la germano, s-ro Bepperling. La finnlandano finis sian parolaĵon per la vortoj: **Vivu la amikeco inter Finnlando kaj Svedlando!** Tion li diris ĥore kun sia samlandano.

S-ro B. nun faris sian paroladon pri **Malnova revo realiĝas**; tradukis la subskribinto. Jam la biblia rakonto pri la Babela lingvo-konfuzo montras, kiomgrade la homoj sentis la malfacilaĵojn de la multlingveco. Ĉiam la homoj sopiris al komuna lingvo, sed nur nun la ilo estas preta. Kaj ĝi estas plene **aktuala**, ĉar ni vivas en periodo de internacieco: komerco, turismo, tekniko, scienco absolute postulas internacian lingvon. La ilo estas **Esperanto**, kreita antaŭ 50 jaroj.

Ofte en la pasinto oni provis, mondlingvigi iun nacian lingvon, sed neniam oni sukcesis por la daŭro. **Nacia lingvo kiel mondlingvo estas maljusta solvo de la problemo.** Se ekz. la angla fariĝus mondlingvo, tiam la angloj havus avantaĝojn en la konkuro de la popoloj, avantaĝojn, kiujn la nacia sento de la ne-angloj neniam konsentus libervole. (La angloj ne bezonus aparte lerni la mondlingvon, ŝparus do tempon kaj forton por aliaj celoj kaj povus abunde provizi la internacian literaturon per anglaj libroj; la mondo akirus tro da angla spirito!) Krome ĉiuj naciaj kaj ankaŭ la **klasikaj lingvoj** estas tro komplikaj, kion pravas la multjara kaj tamen nesukcesa studo de la latina en niaj gimnazioj. Tial **mondlingvo devas esti artefarita**, ĉar nur tiel ĝi povas esti **kaj neŭtrala kaj simpla.**

Tiujn kvalitojn havas Esperanto. Ĝi estas genia kombinaĵo el la modernaj kulturlingvoj kun bazo latina, do neŭtrala lingvo, kaj ĝi estas malmult-regula kaj senescepta, do facile lernebla lingvo; fine, ĝi havas fiksan akcenton kaj ĉiu litero nur unu elparolon, kion oni tute ne rajtas aserti koncerne la anglan lingvon.

Kompare kun antaŭaj lingvoj artefaritaj Esperanto ne estas papera projekto, sed **viva lingvo.** Ĝi devas esti tia, ĉar ĝia vortaro devenas el la naturaj lingvoj. Ŝame kiel iu

landa lingvo estas la kvintesenco de la provincaj dialektoj, same Esperanto estas la kvintesenco de la Eŭropaj landlingvoj. Kaj same kiel la dialektoj ankoraŭ ekzistas apud la regnaj lingvoj, same ĉi-lastaj povos ekzisti apud Esperanto. Alie dirite: Esperanto ne celas forpuŝi la nun ekzistantajn lingvojn, ĝi volas esti nur **helplingvo** por internaciaj bezonoj.

Al la aserto "**artefarita lingvo ne eblas**", ĉar lingvo estas io viva kaj vivon oni ne povas arte fari" ni simple respondas per la **fakto**, ke ĉi tie en Vigbyholm per artlingvo interkompreniĝas reprezentanoj el la sveda, latva, rumana kaj germana popoloj kaj dum la ĉiujaraj kongresoj de Esperanto miloj da homoj el almenaŭ 20 nacioj. Cetere oni ja ankaŭ pruvis "science" la neblon de la fervojo, kiam ĝi jam funkciis.

Kvankam Esperanto ekzistas nur duonan jarcenton, ĝi jam havas ampleksan **literaturon** kaj tradukitan kaj originalan. Al la lasta speco apartenas tia grava verko kia "Fine mi komprenas la radion" de Aisberg, verko unika por tekniko kaj instruado, verko, **kiun oni el Esperanto tradukis en 13 lingvojn**. Ke la belsona Esperanto ankaŭ bone taŭgas en la poezio, montru strofo el la **poemo** "La vojo", originale verkita de la aŭtoro de Esperanto, d-ro Zamenhof:

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan, ktp.

Post la prelego f-ino Bergström dankis al la publiko pro ties atento kaj menciis, ke oni povas aĉeti vortaron kaj gramatikon de Esperanto en malgranda kajero, la **ŝlosilo**, kiu kostas nur 10 oerojn. Ni vendis 17 ekzemplerojn.

Walter Söderqvist

## 2. Ĵaŭde, la sepan de julio

Por la anoj kaj la direktoro de "Röstskolan" prelegis s-ro Morariu pri **Rumanujo, la lando de la oleo-fontoj**. Unue s-ro Jakobsson el Kiruna bonven-salutis la ĉeestantojn kaj prezentis la prelegiston kaj la interpretiston, kiu estis la subskribinto.

Vestita en la popolvesto de sia lando s-ro M. lerte kaj aktore kiel ĉiam rakontis pri historio, produktoj kaj ankaŭ legendoj kaj anekdotoj de Romanujo. Post la prelego li montris kaj priparolis belajn kaj interesajn lumbildojn, kaj interpretisto dum tiu parto de la programo estis s-ro Kurt Salomonsson el Malmö. Je la fino la aŭskultintoj dankis per fortaj aplaŭdoj, kaj multaj el ili aĉetis la Esperantan ŝlosilon.

Anna-Lisa Edenburg

### 3. Marde, la dek-duan de julio

Okazis prelego de la subskribinto pri **La hazardo en la Esperanta literaturo**.

La hazardo estas unu el la plej gravaj faktoroj de la homo historio. Nun ni forigu la demandon, ĉu entute ekzistas hazardo aŭ ĉiu okazo estas la rezulto de la tute determinitaj necesoj; **ni akceptu la ĉiutagan enhavon de la vorto**.

**La literaturo estas io simila al la vivo**. La literaturisto kreas vivon en siaj verkoj kaj kopias la manieron de la vera vivkreado. Ankaŭ li do ne preterlasas la aplikon kaj enmikson de la hazardo.

**Sed dependas multe de la verkisto**, kiel li uzas tiun ĉi gravan faktoron de la fabelteksta arto. Ni pripensu nur, kiel arta kaj pripensiga estas la rolo de la hazardo en la unua granda filmo de **Chaplin**, en la "Oro-febro", kie ĝi klare montras la relativan valoron, tamen la neceson de la homa optimismo en la mezo de la kolosaj naturfortoj.

**Ni elektu kelkajn esperantistajn verkistojn**, en kies verkado la hazardo havas certan rolon kaj iomete analizu, kia estas en ilia uzado la hazardo, resp. **kian celon oni kaŝas aŭ malkaŝas** per tio. Ni ne parolas pri verkistoj, kiuj tiomgrade enigis en sian verkadon la hazardon, ke ĝi troas je la malfavoro de la literaturo.

Unue ni parolu pri la romano de Forge: **Mr Tot aĉetas mil okulojn**. Post la konigo de la enhavo ni konstatas, ke **la tuta romano estas traplektita de hazardaĵoj**, sed la plektaĵo estas **sendube arta** kaj ke la verkista celo de Forge estas nur la **amuzo**. La moral-instruo estas trovebla nur en tre palaj makuloj en la verko.

**Julio Baghy** uzas tute alie la hazardon. Por li la romano estas nur **predikejo**, de kie li predikas strangan **miksaĵon el pesimismo kaj optimismo**. Analizo de la romano **Viktimoj** montras, ke ĝia **pesimisma parto estas indikita de tute romantika hazardaĵo** de unu el la rolantoj (Doŝky, kiu estas ido de nobelino, sed nun kaŝas sian nomon pro fatala afero pri sia patrino: li, kiel konfesprenanta pastro, hazarde akceptis la konfeson de la patrino, pri kiu li eksciis, ke ŝi estas seninda je la nomo "patrino" ktp.); samtempe **la optimisma figuro de la romano estas tia sen artifika motivigo**. Ni klare vidas do, ke la verkista individuo de Baghy estas **origine optimisma** kaj la malpli origina parto estas la pesimismo.. Krome **lia hazardo jam ne estas ĉefaĵo** kaj rilatas ne la tutan romanon, sed nur detalojn.

**Raymond Schwartz** estas **malpli romantika** verkisto ol Baghy. Lia hazardo estas **parte nur formala**, kiam li uzas la vort-eblecon por preskaŭ **vortlude rimi** (har-akiri =

akiri haron, harakiri = japane sin mortigi), **parte tute ĉiutaga**, kiel en la romaneto **Anni kaj Montmartre**, kie el senpretenda hazardo ekiras la historio; tiu ĉi historio havas la nuran celon, veki nian konsciencon pri tio, ke ne ĉio estas ideala en la mondo, kaj **la hazardo havas rolon nur ĉe la ekirigo de la temo**, same kiel Ŝtoneto ekirigas lavangon.

Ĉe **Stellan Engholm** la hazardo estas ankoraŭ pli senpretenda. Lia verkado serĉas la instruon en la ĉiutaga vivo. Liaj figuroj vivas sufiĉe mallaŭtan vivon, tamen instruan kaj ne senenhavan. Hazarda renkonto de junulo kaj junulino: oni apenaŭ trovas pli da hazardaĵoj en lia **Al Torento**. **Nur tiom da artifiko kiom nepre necesas**: tio povas esti la devizo de Engholm, kiu cetere ne predikas kiel Baghy, sed **per la pura konstato** (kiel ankaŭ Schwartz) **vekas nian malkontenton pri niaj sociaj rilatoj**.

Laste ni parolu pri **Weinhengst**. En lia **Turstrato 4** ni denove vidas grandiĝi la rolon de la hazardaĵoj. En la malhela romano la elirpunkto estas la hazardo, sed tie ni vidas ankaŭ la leĝo de la Krizo: **oni devas pereji, ĉar la senlaboreco neniigas neeviteble ĉiun kaj ĉion**. La hazardaĵoj en la romano prefere substrekas la nekontraŭstareblon de la pesimisma konkludo. **La hazardo ankaŭ ĉe li estas en la servo de la tendenco**, kaj ĉar lia tendenco estas multe pli subjektiva kaj helpopeta ol tiu de Engholm kaj Schwartz, lia hazardo similas iom tiun de Baghy, sed ĝi malhavas ties tomantikajn konturojn.

Resume: Ĉe **Forge** la hazardo estas kvazaŭ **celo**, ĉe Baghy fundamento de certa **prediko**, ĉe Schwartz motivo por **ekirigi la historion**, ĉe Engholm **necesa sed negrava ŝraŭbo**, ĉe Weinhengst **ŝajna gravaĵo sen vera signifo**.

Ferenc Szilágyi

## VII. PARTOPRENO EN KLUBKUNVENOJ

### 1. Vendrede, la okan de julio

La bone vizititan kunvenon de la Stokholma Esperanto-Klubo **Laborista** en Fåfången malfermis la kluba prezidanto, s-ro Robert Sandström, kiu salutis la ĉeestantojn, precipe la eksterlandanojn kaj la kursanojn de Vigbyholm. Dankis kaj resalutis s-ro Bepperling.

Sekvis tiu parto de la programo, kiun faris la kursanoj. Unu el ili memorigis pri la gravo de nia laboro tiel konvinke, kiel povas fari nur vera esperantisto. La latvo, s-ro Mikelsons, parolis pri kelkaj **pioniroj de nia movado**, Einstein, Trompeter k.a. Poste s-ro Jokinen

skizis la evoluon de la **laborista Esp.-Asocio en Finnlando**; tiu asocio jam venkis multajn malfacilaĵojn, kaj oni esperas multon por la estonto. S-ro B. dankis kaj tiam i.e. menciis, ke jam kelkfoje movado longtempe malforta subite kreskis, kaj ke oni laŭ la raporto el Finnlando povas atendi ion tian.

Poste ticevis la parolon la aliaj ĉeestantaj eksterlandanoj. Du **anglaj** samideanoj salutis en la nomo de la anglaj esperantistoj, kaj unu el ili, s-ro Mell (la kara Mello = karamelo), diris, ke nun bedaŭrinde la Esperanto-movado en Anglio ne multe evoluas, eble pro tio, ke oni konsideras la anglan lingvon mondlingvo; ŝajnas al li, ke la sveda movado estas tre vigla. Poste salutis nin la **polo**, s-ro Majewski, kiu estis feliĉa, renkonti s-ron Morariu, kun kiu li precize antaŭ unu jaro konatiĝis okaze de la Varsovia kongreso. La **hungar-devena rumano** s-ro Morariu respondis per kelkaj spritaĵoj al la polo kaj al la **germano** s-ro B., kiu per ruĝa fadeno kunligis ĉiujn paroladetojn. Post kortuŝa alparolo de alia hungar-rumano, s-ro Szabád, fine raportis "Pario" pri la **bulgaraj** esperantistoj. En Bulgario la laborista Esp.-movado estas malpermesita. La neŭtrala movado en la Balkan-ŝtatoj estis vigla en la komenco, sed poste la malbonaj cirkonstancoj postmilitaj malhelpis ĝin; tamen lastatempe venis nova forta Esperanto-ondo, kaj eble Sofia en la estonto fariĝos ĉefurbo de Esperantio.

Sekvis gaja **teatraĵo**, en kiu aktorin s-roj Salomonsson kaj Söderqvist kaj la finna samideano Helin. En ĝi oni trovas malnovan manuskripton, kies "pralatinan" tekston historiisto de la latina lingvo tradukas en Esperanton; fakte la teksto de la manuskripto estas verkita en la reformita Esperanto de la jaro 1894.

Dum la kaf-trinkado parolis la prezidanto de SLEA, s-ro Ernst Eriksson. La plej forta impreso el lia parolado estas: **ĉe ni regas demokratio**, la homoj vivas en pli bonaj cirkonstancoj. En kelkaj aliaj landoj oni eĉ ne rajtas labori por Esperanto. La sveda laborista Esp.-asocio havas grandajn taskojn. Estas menciinde, ke la Vigbyholman kurson ebligis ABF, la laborista kleriga asocio. Esperanto estas necesa en la internacia laboro de la laboristoj.

La prezidanto de la klubo diris kelkajn finvortojn, kaj s-ro B. akcentis, kiom gravas la fakto, ke en la parlamento estas tia fervora esperantisto kia Ernst Eriksson.

La agrabla vespero finiĝis per kantado de **Fratoj, al sun', libereco!**

Siri Bergström

## 2. Merkrede, la dek-trian de julio

Je la 20-a alvenis ni Vigbyholmaj kursanoj en la kunvenejo de la **Stokholma Klubo Esperantista**, Vallingatan 3. Iom post iom kolektiĝis ĉirkaŭ cent esperantistoj, tiel ke la ejo estis tute plenigita. La kunvenon malfermis la kluba prezidanto, s-ro Hedgren, kiu bonven-salutis la ĉeestantojn, speciale la eksterlandajn gastojn kaj nin kursanojn de Vigbyholm. Sekvis belaj **solokantoj** de f-ino Ekberg, nome "Largo" de Händel kaj "Idyll" de Ture Langström, kantoj kaj svede kaj Esperante. Poste klubanoj ludis la unuaktan **teatraĵon** "En la vagonaro" de Eva Julin. Ĝi estis bone prezentata, speciale sukcesis la ĉefrolinto s-ro B. Gerdman.

Venis nia parto de la programo, nome **Viva Gazeto**, kiun prezentis al la publiko ĝia redaktoro, s-ro Morariu. Li baldaŭ donis la vorton al la sekretario, s-ro Söderqvist, kiu montris la grandan gazeton de li desegnitajn, vere bela kaj bona laboro. Sed la gazeto havis [ne?] nur eksterajon belan, la enhavon prezentis la artikol-farintoj mem. Unue aŭdiĝis la **ĉefartikolo** de la skanio Kurt Salomonsson, artikolo traktanta sprite ĉiujn kunlaborantojn. Poste deklamis Asta Håkansson la poemon **Espero** de Schiller. Siri Bergström rakontis ŝercan historion pri **unupieda birdo**. Sekvis la **karamela dramo**, en kiu s-ro Mell el Anglujo ludis la rivalon, Siri Bergström la edzinon kaj Walter Söderqvist la edzon. La **distrita profesoro** de Kaarlo Jokinen el Finnlando elvokis diafragmo-skuan ridegon. S-ro Mikelsons el Latvuj, ŝerce nomita la problem-infano, rakontis pri siaj **vojaĝoj**, kaj poste Anna Dahlgren faris sagace-spiritan **studon psikologian** pri tiu problem-infano. La poemon **La kapelo** de Uhland deklamis Bertil Svensson. Sekvis unuakta komedio **En angla hotelo**, kiun ludis Elsa Nyberg (hotel-servistino), Bertil Svensson (gasto), s-ro Morariu kaj Kurt Samuelsson (voĉoj de geedzoj). Anna-Lisa Edenburg legis amuzajn **anoncojn** kaj **notojn**, kiujn kompletigis la redaktoro. S-ro Bepperling deklamis Esperante kaj germane **La fajro-sonorilo** de Schiller kaj s-ro Morariu **Sonorila ludo** de Kaloczay. Komune ni kantis **Nun radias la sonoj de la grandsonoril'** laŭ la melodio de "Engelbrektsmarschen". **La grandan dramon**, kiu abrupte ĉesas pro malsano de aktoro, prezentis d-ro Szilágyi, kaj fine s-ro Mell rakontis ŝercaĵojn kaj kantis kune kun samlandano.

Post la kafaŭzo parolis redaktoro Paul Nylén, menciante la ĉeeston de reprezentantoj el **sep nacioj** kaj grantulante la kursanojn de Vigbyholm pro la bone farita Viva Gazeto. Siri Bergström kaj Anna-Lisa Edenburg kantis la vortludan kanton **Ĉiuj katoj miaŭas**. F-ino Ekberg solkantis, nome **Sonoriloj** de Geijer, **Amkanteto** kaj **En sopiro**. Poste parolis s-ro Mell, dankante en la nomo de la Vigbyholmaj kaj rakontante gajan **aneddoton**. La kunestadon ni finis per la **Himno**.

Anna-Lisa Edenburg

## VIII. EKSKURSO AL TULLINGE

### Dimanĉe la dekan de julio

Ĉiuj partprenantoj de la ekskurso kolektiĝis antaŭ la centra stacidomo je la 10-a matene. Kelkajn minutojn poste ni ekveturis per la trajno al Tullinge. Spite la malbonan veteron partoprenis multaj samideanoj, krom la instrukcia kurso ankaŭ klubanoj el Enskede, Nacka kaj Huddinge. Krome partoprenis kelkaj anglaj esp-istoj kaj la fama hungara verkisto d-ro Szilágyi.

La vetero estis tre malbona, ĉar daŭre pluvis, sed ni ĉiuj esperis, ke baldaŭ heliĝos. Je la 11-a kaj 30 ni atingis post 45-minuta marŝo la celon de nia vojaĝo, **Torpet**, kiu situas 4 kilometrojn for de Tullinge. Ĉar ankoraŭ pluvis, ni eniris la domon, kiu estas ejo por turistoj. La unusola ĉambro estis iom tro malgranda por ĉiuj vojaĝantoj, sed ni tamen sentis nin hejme en ĝi. Ni ja estis inter samideanoj, samcelanoj. Foje ni povis eĉ eliri por iomaj promeno kaj bano.

**La tago agrable kaj rapide pasis malgraŭ la pluvado.** Kion ni faris? Nu, tuj post la alveno ni trinkis kafon, kiun ni ricevis de la doma mastro; manĝaĵojn ni jam kunportis. Poste ni multe kantis. Kelkaj esp-istoj amuzis nin, rakontante spritaĵojn. Ni ankaŭ distris nin per vortludoj. Unu el la partoprenantoj ludis tirharmonikon, tiel ke ni ankaŭ havis okazon por dancado.

Je la 2-a kaj 30 ni ekvojaĝis hejmen. S-ro Malmgren esprimis nian dankon al la posedantoj de Torpet, kaj ni kriis **trioblan huraon por la Esperanto-movado**. Alveninte en la ĉefurbo ni komune tagmanĝis kun bona apetito. Laŭ la ekskursiva programo okazis ankoraŭ vojaĝo "boate sub la pontoj de Stokholmo", kiun tamen pro la malbona vetero ne ĉiuj partoprenis.

Kvankam la vetero-dio ne favoris al ni, la ekskurso fariĝis unu el la plej bonaj memoroj de nia kursa kunesto dank' al **kamaradeco kaj bona humoro**.

Bertil Svensson

## IX. KURSA ORGANIZO

(Protokolinto: Elsa Nyberg)

Sabate, la naŭan de julio

Instruis s-ro Morariu. Antaŭ komenca kurso necesas bone anonci ĝin. Oni devas **propagandi** persone kaj per afiŝoj, gazetoj, leteroj. Oni ankaŭ aranĝu **ekspozicion** kun internaciaj korespondaĵoj kaj memoraĵoj, laŭeble neordinaraj. Afiŝoj kaj ekspozicioj ĉiam devas altiri atenton.

Antaŭ la kurso estu ankaŭ **prelego** kun publika **provleciono**; tiu leciono nepre estu pagata, ĉar nur senvaloraj aferoj estas senkostaj.\*

*\*) Mi ne konsilis, ke oni enkasigu kotizon ĉe (preferinde senkosta) provleciono.*

*/Tiberio Morariu*

Komencante la kurson oni diru, ke la partoprenantoj per tiu kurso ne lernos la lingvon tute, sed ke ili ricevos frazojn por kompreno kaj ekzerco kaj ke ili tiel akiros la **fundamenton por venontaj studoj**.

Oni devas havi **laboran** kaj **financan komitatojn**. Tre utilas elekti **honoran komitaton**, al kiu apartenu eminentaj personoj.

Kunlaboro en la **tagaj gazetoj** gravas por la propagando.

## X. ESPERANTAJ ORGANIZAĴOJ

Vendrede, la dek-kvinan de julio

La lecionon enkondukis kanto.

La instruisto, s-ro martin Johansson, iom parolis pri **landaj** kaj **tutmondaj organizoj**, ekz. SEF, SLEA, UEA, IEL, SAT. Poste ni transiris al traktado de **fakaj** organizoj. F-ino Kristoffersson, Stokholmo, informis pri **Kristana Esperanto-Ligo Internacia** kaj s-ro Johansson pri la celoj kaj taskoj de la fakaj organizoj ĝenerale.

Post la paŭzo s-ro J. parolis pri la fak-organizo de la **tramistoj**, al kiu li mem apartenas. S-ro Jokinen/ Helsinki menciis, ke en Finnlando, kie la Esperanto-movado ĵus vekigis post longa dormo, ankoraŭ ne ekzistas fakaj organizoj. S-ro Söderqvist/ Åtvidaberg



opiniis, ke la **kooperativo**, kies membro li estas, ne favoras al Esperanto. S-ro Jakobsson el Kiruna donis raporton pri la **fervojistaj** esp-istoj. F-ino Nyberg el Boden sciigis, ke la tiea A.B.F. kontraŭas Esperanton kaj ne volas havi ĝin kiel stud-temon. Ŝi demandis, kiel oni interesi tiun A.B.F.-sekcion pri Esperanto. La kursanoj diskutis la problemon kaj venis al la konkludo, ke oni devas provi, elekti esperantistojn en la estraron. Fine ni aŭdis s-ron Mikelsons el Riga pri Esperanto ĉe la **kvakeroj**.

Kurt Salomonsson

## XI. LA ESPERANTA EKZAMENO

Lunde, la kvaran de julio

Je la 19-a horo enkondukis rektoro Jansson sian instruon pri la Esperanta ekzameno per starigo de la demando: **Kial ekzameno?**

Erara estas la oplnio, ke elementa ekzameno estas senutila, superflua. Oni devas rekomendi ĝin jam pro tio, ke la ekzamenato havas okazon, **kontroli**, kiom li lernis, kiom li ne bone atentis kaj kiom li tute forgesis el la ĵus finita kurso.. Li estas devigata **korekti siajn erarojn**, kaj ju pli frue li faras tion, des pli bone por li, ĉar fruaj impresoj fiksiĝas pli bone en la memoro ol malfruaj. Krome oni transpasu ekzamenon por **beligi la statistikon**, kio siavice forte influas la propagandon. Fine la **kotizo**, kiun devas pagi la ekzamenatoj al la instituto, estas utiligebla por aranĝo de kursoj kaj disdono de stipendioj.

Sekvis "ŝajna" ekzameno. Ĉiu partoprenanto ricevis Esperantan tekston, el kiu oni laŭvice voĉlegis; poste ĉiu tradukis kelkajn frazojn sveden.

Inga Kristoffersson

## XII. KURSFINA FESTO

Vendrede, la dek-kvinan de julio

La finfesto okazis en la granda salono de Vigbyholm kun ĉeesto de la instruistoj kaj kursanoj kaj kelkaj gastoj, nome s-ino kaj f-inoj Jansson, s-ino Boye kaj s-roj Halldor kaj Wästfelt.

La ĉeestantoj eksidis ĉirkaŭ la kaftablo, kiu estis bele ornamita per **floroj, flagoj** kaj **rubandoj**. Unue ni kantis la Vigbyholman kanton, kaj post la kaftrinko **okazis ornamado per verdaj steloj** (faritaj de la kursano Walter Söderqvist, Åtvidaberg). Orajn ricevis rektoro Jansson kaj redaktoro Nylén, arĝentajn la aliaj instruistoj kaj f-ino Kristoffersson. La ornamadon prizorgis f-ino Siri Bergström, esprimante al la ornamatoj la dankon de la kursanoj kaj finante tiel: "Restas nun verdaj steloj pli simplaj, kaj se ni kursanoj meritas ilin, la instruistoj ornamu nin!" Feliĉe tio okazis!

Poste kantis la kursanoj **danko-kanton** al la instruistoj laŭ la melodio de "Gubben Noak". Surprize rektoro Jansson dankis kante laŭ la sama melodio.

Sekvis danko tre kortuŝa de la kursano Kaarlo Jokinen el Finnlando, kaj poste parolis s-ino Boye, redaktoro Nylén, s-ro Martin Johansson, s-ro Morariu kaj s-ro Bepperling, la laste nomita improvize pri la diversaj dank-manieroj.

Kun granda emocio ni finis, kantante la Esperantan himnon.

Antaŭ ol ni foriris, montris f-ino Bergström per ŝercaĵo, kiel la Esperanta rondo pli kaj pli disvastiĝos. Kaj kun tiu bildo en la memoro ni iru, por esperantistigi la homojn!

Anna-Lisa Edenburg

### XIII. FINPAROLADO

#### Sabate, la dek-sesan de julio

Karaj geamikoj, baldaŭ finiĝos nia seminaria kurso 1938. Mi ĝojas ke mi havas okazon, antaŭ la fino danki al vi ĉiuj por la **granda intereso**, kiun vi montris dum la tuta tempo. Mi dankas en la nomo de nia Esperanto-movado, ĉar mi esperas ke via energio ne elĉerpiĝos sed portos fruktojn diversajn en **daŭra studado** de la temoj pritraktitaj ĉi tie kaj en **instruado de novaj esperantistoj** kaj lerta gvidado de tiuj, por ke la movado kresku kvante kaj pliboniĝu kvalite.

Mi esperas, ke vi bonvole pardonos al mi precipe kaj al viaj instruistoj ankaŭ, ke ni **laborigis vin tre multe**, tiel ke tiu ĉi iom veter-ŝanĝa periodo ne estiĝis tiom ripoziga kiom vi eble deziris kaj ni preskaŭ promesis. Vi certe komprenas ke ni volis uzi la karan tempon de la kunesto, por helpi vin atingi plejeble altan nivelon, pensante ke ĉiam estos sufiĉe da tempo por nelaboro.

Mi volus peti vin atenti tri gravajn labor-kampojn precipe: la radion kaj la gazetaron por la propagando kaj la lernejojn por la instruado. La **radio** povas atingi la plej vastan publikon. Ĝi devas atenti Esperanton kaj atentigi pri Esperanto kiel helplingvo. Ni ĉiam aŭ ofte **danku al la stacioj por la sendoj**. Ni atentigu amikojn kaj konatojn pri tiuj sendoj, ni **plendu, ke ne okazas sufiĉe ofte**, ni donu proponojn por ilia plibonigo t.e. por ke la programoj estu pli kaj pli allogaj ankaŭ por la neesperantista publiko. Nura danko estas facile sendebla per la **kartoj de Turistföreningen** (4 oeroj po karto + 5-oera poŝtmarko).

La **gazetaron** ni igu favora al nia movado kiel eble plej. Ni donu al ĝi **interesajn novaĵojn**, kiujn ni ricevis pere de nia korespondado aŭ niaj gazetoj. Petu **permeson traduki artikolojn** kiuj povus interesi amikojn alilandajn. Petu amikojn **danki por artikoloj**. Vizitu **redaktorojn**, kiam venos **eksterlanda interesa gasto** al via loko, por ke li rakontu pri siaj lando kaj vojaĝoj. Preparu por Fejde, kiu peras **gazetkurson**, petante tian antaŭ lia alveno. Skribu mem pri **vojaĝoj en aliaj landoj** kaj pri kunvenoj. Ne forgesu **fakajn gazetojn**.

Preparu la enkondukon de Esperanto en la **lernejojn**, instruante Esperanton tiel lerte, ke la infanoj sopiros havi pli kaj tial petos la gepatrojn postuli enkondukon. Helpu ilin **korespondi** kaj petu ilin **montri la leterojn al amikoj** kaj konatoj. Parolu kun kolegoj kaj instruistoj pri la **multflanka utilo de Esperanto**. Rakontu ke Esp-a instruado okazis jam en **tre multaj lokoj kaj landoj** kun bonega rezulto. Parolu kun **fakuloj** kaj **estraroj**. Dividu la laboron, kiam venos favora momento por enkonduko. Sendu vian petskribon al la **Sveda Esperanto-Instituto**, por ke ĝi helpu pri la vortigo de la peto, ĉar multe dependas de la motivigo kaj de la ekzemploj montritaj.

Mi finas, dirante ke ni atendas ĝojigajn novaĵojn de viaj hejmlokoj pri **sukcesaj kursoj**, pri **forta klubvivo**, pri kresko de **bonaj helpantoj**, kiuj siavice venos al niaj **someraj kursoj**, kiujn ni esperas per via helpo fari pli kaj pli bonaj. Kaj laste ni atendas la **finfaron de komencitaj ekzamenoj**. Ĝis revido!

La rektoro



Vigbyholm